

# Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE  
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

ԹԻՔԵՆՅԱԻ  
ՅԵՐԱՅԵՆԻՔՈՒՃԸՄՅ

La Zagreba Observatorio

Ĉi-numere legu pri:  
**OMAGĜE AL GABRIJEL DIVJANOVIĆ**  
**DECEMBRO EN FUNEBRO:**  
**MORTIS VIDA JERMAN (1939-2011)**  
**ESPERANTO EN LA ZAGREBA OBSERVATORIO**  
**MIRAKLO DE PRIMOŠTENO**  
**ETA REMEMORO PRI "ZEL-ano"**  
**LA DISKONTINUECO DE**  
**MOHOROVIĆIĆ**

6

2011

## Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj  
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

## Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević  
Goljak 43  
HR-10000 Zagreb  
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

## Plenumredaktoro:

Josip Pleadin  
B. Jelačića 138 A  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
josip.pleadin@gmail.com

## Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
grafokom@kc.htnet.hr  
zagreba.esperantisto@gmail.com

## Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana  
Habulin, Marija Jerković,  
Vida Jerman, Jozo Marević,  
Radenko Milošević,  
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

## Presis:

Grafokom, Đurđevac

## Aperritmo:

Neregula

## Konto de UZE:

2340009-1110321529  
(Privredna banka, Zagreb)

## UEA-kodo:

uzes-y

## RESUMO

Per tiu ĉi numero ni finas nian kvinan jarkolekton, almenaŭ parte reordigante la aperritmon. Ĝi estas iasence "tema" numero, ĉar per ĝi ni omaĝas la laboron de esperantistoj-astronomoj kaj ilian gvidanton Gabrijel Divjanović. Al la nomo de Gabrijel Divjanović ligiĝas multaj eventoj en la iama jugoslavia Esperantujo, kies starto estis en la jaro 1961. La ĉefa tiutempa evento estis fondo de Esperanto-kampadejo en Primošteno ĉe la adriatika marbordo, sed ne malpli gravas ankaŭ aperigo de faka revuo "Homo kaj kosmo" destinita al popularsciencaj kaj astronomiaj temoj. En 1961 aperis ankaŭ la fama kolektive verkita romano "Tragedio en la Universo". Ĉar Gabrijel Divjanović, populare inter amikoj nomita Gabro, forpasis antaŭ du jardekoj (en 1991), estis trafa momento por omaĝi al li kaj al rezultoj de lia laboro. Ni revenigas la legantojn en la epokon de Divjanović, Promišteno kaj astronomoj de Zagreba Observatorio per pluraj artikoloj.


Senpere antaŭ finredakto de ĉi tiu numero atingis nin la trista informo, ke forpasis nia redakcianino, membrino de la estraro de KEL kaj la fama Esperanto-aktorino Vida Jerman. Per ŝia forpaso la Esperanta kulturo perdis la plej obstinan ambasadorinon, kaj la kroata esperantistaro neanstataŭigeble sentos ŝian foreston. La adiaŭo de Vida okazis la 16-an de decembro en la Krematorio de Zagreb precize je la sama tempo kiam estis planita la omaĝa programo pri Gabrijel Divjanović. Pro tio la UZE-estraro lastmomente decidis ne okazigi la programon, sed ebligi al ĉiuj kroataj esperantistoj adiaŭi de Vida. Ĉe ŝia kuŝejo kolektiĝis la tuta kroata esperantistaro, ĉar tiel monumentaj personecoj en nia historio aperas tre malofte.

En ĉi tiu numero ni klopodis vekti intereson ankaŭ pri astronomio kaj sciencoj ĝenerale, pro kio ni aperigis eĉ tri scienc(popular)ajn artikolojn.

Inter esperantistoj multfoje restas nekonataj aŭ nesufiĉe konataj samideanoj. Grandan intervjuon ni publikigas pri Géza Kurucz, la ĉefa motoro de la gazeto "Juna amiko", kiu ĉi-jare forlasis la redaktoran laboron. Ni mencias ankaŭ la esperantistecon de la konata bjelovara poeto Željko Sabol, kaj la samideanojn, kiuj same kiel Vida foriris el niaj vicoj, sed kies laboro ne rajstas esti forgesita.

Kun aparta kontento ni rememorigas vin ankaŭ pri la gazeto "ZELano", kiu estis "praformo" de "Zagreba Esperantisto", esperante ke vi restos niaj legantoj kaj subtenantoj antaŭ estonte.

# *Gabrijel Divjanović*



# ESPERANTO EN LA ZAGREBA OBSERVATORIO

 Redakcia kompilo

La zagreba Observatorio sian sidejon havas en la malnova turo el la 13-a jarcento, nomiĝanta **Popov toranj** (vidu la frontpaĝan foton). Sur la supro de tiu turo en la jaro 1903 estis konstruita kupolo kun la astronomia observatorio. Por ne detaligi la historion de tiu institucio, ni nur menci la tempon kiu por esperantistoj estas la plej grava. En la jaro 1954 la estro de la observatorio fariĝis **Gabrijel Divjanović**, homo iasence kontroversa, ĉar li estis doktoro de jurscienco, eksa partizana batalanto atinginta la pozicion de helpanto de ŝtata prokuristo, posta politika kondamnito, kaj finfine unu el la plej grandaj popularigantoj de natursciencoj en Kroatio kaj nerenversebla idealisto pro sia okupiĝo pri Esperanto.



*H vi,  
ho miaj junaj geamikoj el Hiroŝima  
kaj Nagasaki, kies ekburgona viv-  
printempo kruele forfajris dum la  
infera disfuriĝo el la atoma mon-  
straĝo,*

*estu dediĉita tiu ĉi libro!*

*Via senkulpa morto brulstampis  
sur la konscienco de la tuta  
mondo eternan akuzon pro la  
malhumana misuzo de scienco  
kaj ĝiaj konkeroj.*

*La aŭtoroj.*

**Dediĉo en la libro "Tragedio en la Universo".**

Post la travivita Golgoto en la punejo de **Goli otok**, al li estis forprenitaj civitanaj rajtoj, respektive li poreterne restis sen pasporto, kio malebligis al li vojaĝojn ekster la tiam Jugoslavio.

Jam en la jaro 1945 li aperigis kroatlingvan libreton **"Zemlja i svemir"** (Tero kaj Universo), kaj poste ĝian titolon li uzis por samtitoligi la observatorian natursciencan gazeton, ekaperintan en 1956. Tiu gazeto poste ŝanĝis la titolon al **"Čovjek i svemir"** (Homo kaj kosmo).

Malgraŭ la malfacila tempo pasigita en Goli otok, la spirito de Gabro oni en sukcesis frakasi. Sen la ebleco vojaĝi fizike, li fariĝis skribanta mondvojaĝanto. Li opiniis ke la ĉielo estas libera spaco, tute kontraŭe ol la surtera dividiteco per landlimoj kaj multeco da lingvoj, kio fariĝis grava malfacilaĵo en la komunikado. Kiel junulo li ellernis Esperanton aŭtodidakte, kaj fariĝis ĝia fervora adepto. Post kiam en la Observatorio kolektiĝis gejunuloj soifantaj pri natursciencoj kaj astronomio, ili akceptis ankaŭ

liajn ideojn pri amikeco kun la mondo, kaj pri uzado de Esperanto por tiuj celoj.

Traspertinte la militon, li estis plene konvinkita pri sensececo de kruelaj militoj kaj homa interbuĉado, kaj tiun konvinkon ankoraŭ pli profundigis la eksplodoj de atombomboj en la japanaj urboj Hiroŝimo kaj Nagasako.

Li estis ŝatanto de la universa senfino, kaj revanto pri pli bona, paca kaj tute prudenta mondo. Tiuj ideoj estis temoj de multaj kunestadoj kun la gejunuloj en la Observatorio, kiuj komencis fariĝi liaj disĉiploj.

La kritika momento estis la jaro 1960, kiam en la Observatorio estis verkita tute nekutima romano. Nekutima, ĉar verkita ne de unu sed de dudekvinopo<sup>1)</sup> da aŭtoroj. Nekutima ankaŭ pro sia temo, kaj pro la porpaca mesaĝo kiun ĝi sendis tra la mondo. **"Drama u svemiru"** (Tragedio en la Universo) tiujare aperis kiel originala kroatingva libreto, kiu malferme parolis pri la senevita sorto de nia komuna patrujo la Tero, se inter la homoj ne ekregos prudento kaj saĝo. En la libro nenie estas menciite ke Gabro estis la idea spirito kaj gvidanto de la verkado, sed multaj grupanoj povas atesti pri la nekutima atmosfero dum la naskiĝo de la verko. Ĝi signis la komencon de porpaca kaj homama ideo el la kroata Observatorio al mondvastaj, kiel iaspeca protesto kontraŭ ĉiuj eblaj estontaj nukleaj katastrofoj minacantaj la homspecion.


La junaj astronomoj aparte riĉan rikolton havis en la jaro 1961, la jaro kiam ili ekspediciis al la adriatika insulo Hvar por spekti la totalan suneklipson la 15-an de februaro tiujare. Kiel rezulton de la ekspedicio oni eldonis la dulingvan (kroatan-Esperantan) libreton **"Totala Suneklipso 15. II 1961"**, kun la angla kaj germana resumoj.

En tiu eldonaĵo oni jam trovas plurajn aliajn novaĵojn,

interalie la informon pri la Esperantigo de la antaŭe menciita romano, kiun majstre tradukis la akademiano Ivo Rotkvić kaj kiu aperis en 1961 sub la titolo **"Tragedio en la Universo"**, skuinte kvazaŭ eksplodo la esperantistan mondon pro la bonega traduko, sed antaŭ ĉio pro pacama ideo en ĝi lanĉita.

Printempe de 1961, pli precize dumnokte inter la 20-a kaj 21-a de marto, ekfunkciis ankaŭ la astronomia-esperantista radiostacio, la sola tiaspeca en la tuta mondo, gvidita de **Stanko Vidmar**, **Neven Megušar** kaj **Ante Golubić**.


Dum la mesaĝoj vojaĝis al la mondo tra la radio-ondoj,



**Supre:**  
La grupo kiu funkcigis la radio-stacion ĉe la Zagreba Observatorio.



**Maldekstre:**  
La junaj astronomoj kun la japana vizitanto Eizo Ito



omo kaj kosmo  
peranto-revuo

ankaŭ la papera libro krosis, rikoltante sukcesojn, interalie ankaŭ per tradukoj al aliaj lingvoj pere de Esperanto kiel pontolingvo (portugala, islanda, rusa, japana ktp).

Jam en la sekva jaro, 1962, la Observatorion vizitis prezidanto de Porpaca unuiĝo de Japanio, publicisto kaj poeto **Eizo Itoo**, kaj poste ankaŭ la gimanzianinon **Kuniko Kambara** el Tokio. La vizitojn sekvis intensa korespondado kun japanoj, kaj la granda intereso kaŭzis ankaŭ la duan kroatlingvan eldonon en 1966, kun la aldono de tiu korespondado. Eĉ tri jardekojn poste la libro ne estis forgesita, kaj en 1955, en sia aŭgusta numero, aperigis ĝin la gazeto "**Priroda**" (Naturo). Sen preciza scio en kiuj landoj ĝi estis tradukita kaj eldonita en aliaj lingvoj, oni tamen povas aserti, ke en la tuta mondo ĝi estis ambasadoro de la kroata kulturo kaj spirito, kaj la nomon de la urbo Zagrebo kaj ĝia observatorio ĝi diskonigis tra la tuta terĝlobo.

La bona akcepto de la libro "Trgedio en la Universo" ankoraŭ plifirmigis la ideojn de Divjanović, kiu tiujare intense eklaboris ankoraŭ sur unu projekto: **internacia kampadejo de pacamikoj en Primošteno**.



Ĝi startis la 1-an de julio 1961 en Primošteno, la belega vilaĝeto apud Šibenik. Ĝi estis kapadejo por astronomoj kaj esperantistoj kiel kolektivaj pacamantoj. Divjanović klopodis instrui al astronomoj Esperanton por povi kontakti kaj amikumi kun esperantistoj en la tuta mondo, kaj al esperantistoj li klopodis pliproksimigi la intereson pro astronomio dum beletosaj



vesperoj ĉe la bordo de Adriatiko, nomata "la plej bela maro en la mondo". La ideo el la hodiaŭa perspektivo ŝajnas esti utopia, sed ĝi tamen sukcese realiĝis kaj daŭris. La kampadejo estis konstruita, kaj en ĝi kiel aparta interesaĵo elkreskis "**Gardeno de nacioj**" kun florbedoj, el kiuj ĉiu prezentis unu landon. Al tiu bedo la feriantoj en Primošteno alportadis terbulojn el difinita lando, kaj la kampadejo fieris ĉar al Kroatio venis ankaŭ terbulo el la atombombe detruita Nagasako. Per intermiksado de terbuloj oni prezentis simbole la unuecon

de la mondo, pri kio sopiris ĉiuj progresemaĵoj kaj landoj

Por plifaciligi astronomiajn observojn el la maro kaj por atingi la popularan insuleton **Smokvica**, servis du barkoj: "**Esperanto**" kaj "**Zamenhof**", pri kiuj cirklas onidiroj, ke Gabro mem investis propran monon por havigi ilin.

Sur la teraso super la kampadejo manĝejo funkciis **Turisma observatorio** kun movebla teleskopo, kaj ĉiu serena nokto estis uzata por cielobservado. La teleskopo estis sensacio ankaŭ por la lokanoj,



kiuj pli kaj pli ofte venadis por partopreni la observadojn.

La simpatio al astronomio kaj Esperanto je tute unika maniero kombiniĝis kun la feriado ĉe la maro kaj turisma popularigo de Primošteno inter diversnaciaj venantaj el ĉiuj mondopartoj.

Cele al popularigo de tiuj tri fakoj (astornomio, Esperanto kaj turismo) jam en 1962 aperis dulingve (kroate kaj Esperante) la libreto *"Kampadejo de pacamikoj sur la bordo de Adriatiko"*, kaj en 1963 ankoraŭ pli bele dezajnita trilingva libreto *"Feliĉigaj ferioj"* de aŭstria esperantisto **Hugo Kraus**, kiu estis ĝisosta ambasadoro de Primošteno kaj la kampadejo. Li mem verkis la tekston kaj faris la fotojn por tiu eldono, invitante potencialajn turistojn aliĝi al tiu *"kantanta feliĉo en la trankvilo kaj amikumado sub la stelplena ĉielo"*.

La ideo pri alproksimiĝo de homoj el diversaj landoj konkretiĝis ankaŭ en la ĝemeliĝo de Primošteno kun la franca urbeto **Vallon Pont d'Arc** en Provenco. Favore al tiu ĝemeliĝo la strato de Primošteno gvidanta al la Esperanta kampadejo estis nomita **Avenuo de Vallon Pont d'Arc**, kaj en la franca ĝemelurbo la ĉefplaco estis nomita *"La Primoštena"*, dum la solenajo kiun en Francio partoprenis la juna kunlaborantino de la Observatorio **Ljiljana Ratar**. La konatiĝo de francoj kaj kroataj esperantistoj-astronomoj okazis en 1962 post la legado de "Tragedio en la Universo". La francoj vizitis Primoštenon kaj proponis la ĝemeliĝon, kiu en la tempo de konkurado en la armado, estis tute nekutima gesto.

En la jaro 1964, apud la ĉefa alirvojo al la kampadejo, en la norda vojparto, estis starigita la *ŝtono de amikeco*, kiu efektive estis malnova mueleja ŝtono, sur kiu la astronomoj ĉizis la nomon de la primoštena Aleo. La starigon gvidis Gabriel Divjanović, kaj la laboron

realigis membroj de internacia laborbrigado *"International Voluntary Service"*, kiuj en Primošteno helpadis dum instalado de akvoduktoj kaj elektro, dum plibeligo de la ĉirkaŭaĵo, konstruado de vojoj ktp. La memorŝtono estis duone enterigita, kaj per sia arko ĝi similis la naturan fenomenon kaj ŝtonan arkon super la riverkanjono, laŭ kio la franca urbo ricevis sian nomon. Pro la konstruado de parkejo, la ŝtono estas translokiĝita, kaj nun ĝi troviĝas maldekstre de la enirejo en la centran primoštenan hotelkomplekson "Zora" kaj "Slava", sed ĝi estas apenaŭ rimarkebla, kaj la preterpasantoj ne komprenas la simbolajn vortojn sur ĝi ĉizitajn.

La kampadejo de pacamikoj ĉesis funkcii en 1968 ĉar turismo kaj idealismo malfacile povis kunvivi. La ideo de Gabro pri konstruado de astronomia observatorio sur la monto **Kremik** super Primošteno, kiun konstruus internaciaj laborbrigadoj, kaj el kiu vastiĝus la rigardo al la maro kaj ĉiuj insuloj de la arkipelago de Ŝibenik, bedaŭrinde ne realiĝis.

En 1963, Divjanović decidis realigi ankoraŭ unu gravan projekton. Nekontenta pro nur sporadaj publikajoj, li deziris starigi konstantan kontakton kun la mondo. En la verkintoj de "Tragedio en la Universo" li havis bonajn kunlaborantoj, kaj ankaŭ novalvenintoj rapide infektigis per la ideoj ŝvebantaj en la zagreba Observatorio.

La ĝis tiam kroatingve aperantan gazeton "Zemlja i svemir", li alinomis al *"Ĉovjek i svemir"*. Sed jam en 1963 ekeldoniĝis la Esperanta varianto de tiu gazeto titolita *"Homo kaj kosmo"*. Ĝi estis la sola kaj unika astronomia gazeto en Esperantujo. Gabro redaktis ĝin ekde la komenco (1963) ĝis la jaro 1984, kaj la lastajn du jarokolektojn (1985-1986) redaktis Damir Mikuličić. La gazeto ĉesis aperi pro manko de financoj.

Kvankam la ĉefa kaj la

plej grava parto de Esperantaj eventoj en la Observatorio kaj ĉirkaŭ ĝi okazis en nur kelkaj jaroj post 1960, la verajn rezultojn de tiu laboro oni devas ankoraŭ detale esplori. Estas necese sisteme esplori kaj priskribi ĉion kio rezultis el sennombraj amikaj esperantistaj-astronomaj internaciaj rilatoj. Pri la graveco de la ideoj kaj faroj de Gabro, ankoraŭ nuntempe multaj eksterlandaj esperantistoj senspire rakontas.

1) La dudekkvinopo da verkantoj estis la aŭtoroj de la kroata versio el 1961, kaj por la Esperanta eldono estas menciitaj 40 persojn, kiel sekvas ĉi-sube.

*"Drama u svemiru" (1960):* Vlatko Bjažić, Toni Breider, Marijan Brezak, Milan Červinka, Branka Damjanić, Ante Golubić, Jadranka Gomerčić, Zoran Horvath, Jerko Kirigin, Zoran Klobučar, Neven Megušar, Ernest Mihalek, Damir Mikuličić, Mihajlo Mustić, Vladimir Pletikapić, Durda Richter, Petar Römer, Ratko Roušal, Ante Sabioncello, Jurica Sertić, Ivan Sugja, Nenad Šepić, Zdenka Šmidt, Stanko Vidmar, Ivica Vranić.

*"Tragedio en la Universo" (1961):* Zlatko Berić, Darko Bidjin, Vlatko Bjažić, Toni Breider, Marijan Brezak, Branka Damjanić, Josip Faklić, Ante Golubić, Jadranka Gomerčić, Ranko Gradečak, Jasmina Hadžibaščaušević, Lucija Ivan, Branko Jelinčić, Sonja Jermaniš, Jerko Kirigin, Zoran Klobučar, Vesna Kolarić, Hrvoje Kraljević, Marko Kuprešanin, Marijan Lenac, Stjepan Malović, Zdenko Marković, Neven Megušar, Ernest Mihalek, Branka Mihelčić, Nada Mihelčić, Damir Mikuličić, Dragan Miličić, Mihajlo Mustić, Miroslav Pećnik, Vesna Petrinović, Ljiljana Ratar, Mikloš Römer, Petar Römer, Ratko Roušal, Marijan Ručević, Zdenka Schmidt, Maksim Skorin, Branka Šranc, Stanko Vidmar.



# TRI KUBETOJ DA SUKERO Josip Pleadin

En la vilaĝo Pitomača siajn pensiajn tagojn vivas la instruisto Luka Hrvatić, kiu en la komenco de 1970-aj jaroj ekŝatis astronomion, kiun li reklamis inter siaj lernantoj en la Elementa lernejo de Pitomača. Per nekutima interplektiĝo de sortoj, s-ro Hrvatić konatiĝis kun Gabrijel Divjanović, la ĉefa heroo de nia rakonto.

Estis precize la 27-a de aprilo 1950. La juna Luka Hrvatić, kun aliaj kondamnitaj elŝipiĝis en la fifama insulo Goli otok. Tiu insuleto kun apenau 5 kvadrataj kilometroj, situanta en norda Adriatiko inter la pli grandaj insuloj Krk kaj Rab, dum jardekoj estis punejo por (precipe) politikaj kondamnitaj, kiujn la tiama reĝimo volis "reeduki".

Per klinitaj kapoj staris vicoj da novkondamnitaj sur la bordo. Oni ne rajtis levi la kapon, nek rigardi la vizaĝojn. En tia humiliga pozicio, Luka rimarkis apud si viron, kiu rapide puŝis en lian manon tri kubetojn da sukero. Li nur memoris lian veston, kaj en postaj tagoj, kiam la kondamnitaj devis paroli pri siaj pekaj, li eksciis



**Luka Hrvatić**

ankaŭ lian nomon. Tiu viro estis Gabrijel Divjanović, ĝis antaŭ nelonge la alte poziciita persono - helpanto de ŝtata prokuristo. Gabrijel Divjanović certe sciis kio okazas al homoj venantaj al Goli otok. Luka memorigis lian nomon, kvankam li poste neniam vidis lin en la punlaborejo.

En la komenco de la 1970-aj, kiam Luka ekinteresiĝis pri astronomio, li ricevis la gazeton "Ĉovjek i svemir", kaj en ĝi li tuj rimarkis la konatan nomon. Kvankam la punitoj eĉ post forlaso de la punejo estis observataj kiel malamikoj de la reĝimo kaj sekvataj de specialaj agentoj, Luka tamen iris al Zagrebo kaj vizitis sian savanton en la oficejo en la Zagreba Observatorio.

Enirinte lian oficejon, Luka diris: "Estimata kamarado, vi savis mian vivon". Li aludis pri la tri kubetoj da sukero, kiuj estis la savo en la momentoj de certa perejo pro elĉerpiga laborado en la punejo. Gabrijel rememoris la eventon. Poste li helpis al Luka labori pri fondo de la astronomia grupo, venadis en Pitomača, ludis violonon en la gajaj societoj, sed neniam plu ili menciis la tri kubetojn kiuj savis la vivon de Luka ...

Eĉ hodiaŭ, kiam Gabro jam ne plu vivas, ĉiuj konsentas ke li estis escepta homo, justa kaj helpema, aparte zorganta pri gejunuloj.



**Goli otok**

# MIRAKLO DE PRIMOŜTENO

 **Hugo Kraus**

*Ĉapitroj el la libro "Feliĉigaj ferioj", 1963. Eldonis Turisma societo, Primoŝteno kunlabore kun la Astronomia observatorio Zagrebo.*

Starante sur la pinto de la "Azenmonto", ni havas antaŭ ni panoramon, kiu gvidas nian rigardon suben, super la maron transen al la duoninsulo Primoŝteno, la vilaĝo sur monteto kronita per preĝejo. Malantaŭ Primoŝteno, lumanta feino, la marbordo ŝovas eksteren al la maro arbaran terlangon, kiu duone formas la Esperanto-Golfon. Sur ĝi kuŝas, kaŝe sub bonaromaj pinio, la tendaro kun siaj restoracio, Societa kaj Sanitara Domoj. Direktante niajn okulojn laŭlonge de la golforiĉa marbordo, ni supozas en la malklareta malproksimo Ŝibenikon, la elirejon por la ŝipa kaj aŭtomobila finveturo al Primoŝteno. Kelkcentmetrojn for de la Esperanto-Duoninsulo elmaras la insuleto Smokvica, populare nomata "Insulo de la Amo".

En Ŝibeniko, fervoja finstacio kaj havenurbo de l' Adriatiko, vi transportigas viajn kofrojn helpe de servisto per veturiletto al la kajo. Tie vi demetas ilin en deponejo kaj vizitas s-anon **Rade Petković** en Prodaavaona "Peko" (ŝuvendejo), respektive en la loĝejo ulica "12. kolovoza 1941" n-ro 11. Estante delegito de Universala Esperanto-Asocio, li en kazo de bezono asistos vin. Lia modela samideaneco konsiderinde kontribuas al la sukceso de Esperantujo Primoŝteno.

La ĉefo de la fervojstacio, s-ro **Velimir Guberina**, kaj liaj du kolegoj trafikestro kaj la manovrestro estas esperantistoj. Ankaŭ ili estas ĉiam helpopretaj.

Finvojaĝante de Ŝibeniko al Primoŝteno, preferu



**Rade Petković**

la ŝipon. Tio plezurigos vin, kontinentulon, per nelonga krozado preter la marbordo. Vian intereson katenos nekutimaj medioj. La popoltipoj sur la ferdeko, ŝaŭmanta ultramaro ĉe la kilo. Diafanaj ondoj. Fiŝarjoj lumetantaj sub la sunradioj. Delfenoj. Flugantaj fiŝoj.

Jen Primoŝteno!  
Malpacienĉeto.

La revenanto: Kiuĵ inter niaj geamikoj jam estas en Primoŝteno? Kion ili plukonstruis intertempe?

La novulo: Kiel oni akceptos min? Ĉu mi estos kontenta pri loĝo, manĝo, ĉu oni amikiĝos al mi? Ĉu mi eble enuos, ĉu pri la tuto ili eventuale fanfaronis iomete?

Vi estu optimisma.





**Velimir Guberina**

La ŝipo pasas inter la Esperanto-Duoninsulo kaj la Insulo de la Amo, turnas sin ĉirkaŭ Primoŝtenon kaj proksimiĝas al la moleo. Inter la multaj gebrunuloj grupeto da nelokanoj: deĵoranta taĉmento de l' junastronomo-esperantista kunlaborantaro de la kampadejo, kun verda flago. Ankaŭ **"Sinjoro Foto-Servo"** (Franĉjo) surpostene por akcepti vin kaj viajn geakompanantojn. Ili helpas al vi pri viaj kofroj kaj gvidos vin al la Turisma Oficejo. Vi prenos viajn kuponojn. Ekiro al via loĝejo en la vilaĝo aŭ al la kampadejo. Tie nia restoracio



**"Sinjoro Foto-Servo" - Franjo Smerdel el Osijek**

kun sia agrablega subombra atmosfero atendas por regali vin. Tie vi miroj pri la bonega ekipo de la Sanitara Domo. Post horeto vi estos refreŝiginta kaj inter la jam gastantaj ges-anoj estos iĝinta perfekta membro de nia serenvizaĝa Familia Rondo Primoŝtena.

Vi estis bonvenigita en la Esperanto-Ferioparadizo, en nia Esperantujo!

Dum la jaro 1492 Kristoforo Kolumbo malkovris Amerikon - jen sonis tiam unu

esperantista "Landon" de la "Nova Sento"!

Ja vere la Lando de la Nova Sento estas ĉie, kie niaj gesamideanoj kunvenas. Sed ĉi tie en nia feriejo realiĝas konkrete io, kio havas karakteron tute specifan, eksterordinaran. Realigiĝas ĉi tie io, kies inĝeniero estas la Penso de doktoro Zamenhof; kies generatoro estas entuziasmo, kies motoroj estas la fervoroj de konsciaj kaj persistaj intelektoj kaj kies efika helpanto estas favoraj turismaj instancoj. Realigiĝas io, konkretigante per



**Gabrijel Divjanović ludas violonon por ekskursantoj**

el la gravegaj sonorilfrapoj de l' epokhorogo de la homa historio.

Dum la jaro 1961 la esperantistoj malkovris Primoŝtenon, la postan internacian ferioaparadizon ĉe la bordo de la blua Adriatiko, Esperantujo!

Farante tian aludon al la trovo de la "Nova Mondo", mi jes konscias la troigon, kiun entenas tiu ĉi komparo, kaj tial, bonvola leganto, afable komprenu ĝin kiel ŝerceton.

Sed tamen - tamen en kazo de nia Primoŝteno temas pri trovo de denove ia "Nova Mondo", pri kiu ni nun heroldas: Ni trovis en tiu feria vivkomuno

ŝtono kaj mortero, per tendaro en pinioparko, per banplezuroj en Esperanto-Golfo, per ŝipado sub la Verda Standardo. Per la faktiĝinta kunvivado de aro da homoj diversnaciaj, sed unulingvaj, dum semajnarano en la libera senzorgeco de belaj ferioj, en romantika pejzaĝo ... ĉe la blua maro! Kie eklernintoj de Esperanto ekkonversacias, kaj kie, ravita de la sorĉa atmosfero inter la membroj de la Zamenhofa Familio, gastoj, neesperantistaj ekavidas studi la Internacian Lingvon hejme, por sekvan jaron reveni kiel esperantistoj; kaj kie eĉ la loka popolo eksamideaniĝas ...

# SUNSIŜTEMOJ KAJ PLANEDOJ ĈIRKAŬ FORAJ STELOJ

 **Amri Wandel\***

## Resumo

Ĝis la 1990-aj ni ne sciis ĉu la foraj steloj (sunoj) havas planedajn sistemojn similajn al nia sunsistemo. Pro la grandegaj distancoj estis ĝis tiam neeble malkovri tiajn planedojn. Nur en 1995 oni malovris la unuan ekster-sunsisteman planedon (eksoplanedo), kaj nur komence de la 2000-aj oni komencis malkovri multajn tiajn planedojn. Ĝis antaŭ unu jaro oni trovis centojn de eksoplanedoj, sed preskaŭ ĉiuj gasaj gigantoj, similaj al Jupitero, kaj netaŭgaj por vivo kiel la nia.

Antau unu jaro ĉio ĉi ŝanĝiĝis. Komence de 2011 la astronomoj publikigis la unuajn rezultoj de la spac-teleskopo "Kepler", dediĉita al serĉado de eksoplanedoj per nova metodo, kaj ene de kelkaj monatoj ĝi malkovris pli ol mil kandidatojn de eksoplanedoj, la plimulto el ili similaj al Tero. Tio estas la plej signifa paŝo en la direkton de ekstertera civilizacioj.

## Enkonduko

En la lasta jardeko la astronomio sukcesis solvi la demadon ĉu ekzistas inter la steloj aliaj planedoj taŭgaj por evoluo de vivo simile al la Tero? Tio estas la faktoro en la Drake-ekvacio, kiu taksas ĉu civilizacioj kaj vivantaj estaĵoj estas oftaj, aŭ nia planedo Tero estas la sola kie evoluis la unika fenomeno de vivo kaj civilizacio. Kvankam la respondon al tiu demando ni ankoraŭ ne konas, oni povas taksu la verŝajnecon por la ekzisto de

viv-kondiĉoj aliloke, ekster la Tero. El la planedoj de nia sunsistemo nur la Tero estas taŭga por vivo: malgraŭ pluraj esploroj ni ne trovis signojn de vivo, eĉ ne premitiva, sur aliaj planedoj ene de nia sunsistemo. Por respondi la demadon ĉu Tero kaj ni estas unika fenomeno aŭ ne, ni devas do esplori planedojn apud aliaj steloj, en aliaj sunsistemoj. Tiajn planedojn, ekster nia sunsistemo ni nomas mallonge "ekstersunaj planedoj" (angle: *Exoplanets*).

Ni devas do serĉi vivon ekster nia sun-sistemo. Tio estas malfacila tasko, pro la grandaj distancoj al aliaj steloj: eĉ la plej najbaraj steloj troviĝas je grandega distanco de ni: cent mil oble la distanco inter la Tero kaj la Suno. La nombro de la steloj estas tre granda: en nia Galaksio troviĝas pli ol cent miliardoj da steloj. Oni povas provi taksu la verŝajnecon por evoluo de vivo apud iu ajn stelo, aŭ alivorte, la nombron de steloj kun vivo. Kiel ni vidis, tiu takso dependas de diversaj faktoroj. Unu el la plej esencaj el tiuj, kaj ĝis antaŭ nelonge nekonata faktoro estas la ekzisto de planedoj ĉirkaŭ aliaj steloj (kiuj mem estas sunoj pli malpli kiel nia Suno).

Eĉ se malgranda parto el ili havus planedojn, estus bona ŝanco trovi planedojn kun taŭgaj kondiĉoj por vivo. Ĉu aliaj sunsistemoj kun planedoj similaj al la nia estas ofta fenomeno aŭ tre malofta? Tiu demando estas grava, ĉar la sola medio en kiu kredeble povas evolui vivo estas sur planedoj: la steloj mem estas kiel dirite sunoj, tro varmaj, kaj la interstela spaco estas tro

malvarma. Laŭ nia tereca sperto, evoluo de vivo bezonas medion kun likva akvo kaj atmosfero, stabila dum miliardoj da jaroj. Tia medio povas ekzisti nur sur planedo ĉirkaŭanta stelon simila al nia suno, ne tro for sed ankaŭ ne tro proksima al sia suno.

Ĝis la lastaj jaroj ni ne sciis ĉu multaj steloj havas planedojn kiel en nia sunsistemo, aŭ planedoj estas malofta fenomeno. Estas tre malfacile observi planedojn ĉirkaŭ aliaj steloj, ĉar la aliaj steloj estas trege malproksimaj de ni, kaj planedoj ne havas propran lumon: ili nur reflektas la lumon de sia suno. Observi planedon eĉ apud proksima stelo similas al provo vidi moneron apud lumturo el distanco de mil kilometroj. Nur lastatempe la astronomoj sukcesis trovi spurojn de planedoj ĉirkaŭ aliaj steloj: la problemo ne estas nur la granda distanco sed la apudeco de tre forta lumo (la lumturo, nome, la stelo) kiu forkaŝas la propran tre malfortan brilon de la monero (la planedo). Malgraŭ la potenco de la modernaj teleskopoj, rekte observi planedojn ĉirkaŭantajn aliajn stelojn estas do trege malfacila tasko, ankoraŭ nebla per la nunaj rimedoj.

## Kiel malkovri ekstersunajn planedojn?

Astronomoj elpensis sep metodojn por malkovri planedojn ĉirkaŭ aliaj steloj.

- La plej fantazia, sed alloga – se ĝi sukcesas – estas serĉi

\* La aŭtoro de la artikolo, Amri Wandel (1954) estas doktoro (supera sciencisto) pri astrofiziko en la universitato de Jerusalemo kaj gastprofesoro en UCLA. Specialisto pri aktivaj galaksioj nigraj truoj kaj astrobiologio. Li doktoriĝis pri astrofiziko en Stony Brook, Novjorko, estis docento en la universitatoj de Princeton, Maryland kaj Stanford. Loĝas en Israelo. Ekde 2010 li estas estrarano de UEA pri scienca kaj faka agado.

la radio-elsendojn de civilizacioj kiuj supozeble evoluis sur kelkaj el tiuj planedoj kun taŭgaj kondiĉoj. La problemo kun tiu metodo estas ke ĝi povas malkovri nur planedojn sur kiuj efektive evoluis teknologia civilizacio, kiuj eble estas tre maloftaj, kaj efektive neniu tia signalo estis jam trovita.

- Alia metodo estas rekta observado de la planedoj. Kiel supre dirite, tiu metodo ne povas sukcesi per la nuna teknologio, ĉar tipa stelo estas milionoble pli brila ol la apuda planedo.

- Tria metodo aplikeblas nur al tre specialaj kazoj – por planedoj ĉirkaŭ pulsaroj, raraj objektoj kiuj emicias tre regulajn radio-pulsojn.

- Kvara metodo baziĝas je efiko nomata gravita lensado – la kurbigo de lumradioj pro la gravita forto de peza objekto, stelo aŭ planedo. Se tia objekto pasas inter ni kaj tre fora lumfonto, gravita lensado povas amplifiki la brilecon de tiu fonto dum mallonga tempo, kiam ĝi estas precize en la ĝusta pozicio. En la lastaj jaroj oni trovis plurajn tiajn amplifikito-eventojn pro planedeca objekto.

- Kvina metodo nomiĝas tranzito. Tranzito signifas ke planedo pasas ĝuste inter ni kaj la suno kaj kaŝas malgrandan parton de la suna lumo. En nia sunsistemo tio okazas kun la planedoj Venuso kaj Merkuro. Por aliaj steloj tiu fenomeno estas multe malpli facile observebla kaj estas aplikebla nur al malmultaj kazoj, kiam la orbito de la planedo estas precize en la sama ebenaĵo kiel nia vid-linio al tiu stelo. Du satelitaj teleskopoj jam funkcias per tiu metodo dum la lasta jaro: la eŭropa-franca “Korot”, kaj la usona “Kepler”, kiu malkovris pli ol mil planedoj.

- La sesa metodo utiligas la ŝanĝetojn kiujn planedo kaŭzas en la pozicio de la stelo kiun ĝi ĉirkaŭas. Ĉiuj steloj moviĝas en pli-malpli cirkla orbito ĉirkaŭ la centro de la Galaksio, sed aldone ili havas propran movadon, rilate al la Suno. Pro la gravita influo de ĉirkaŭanta planedo tiu movado

ne estas en glata linio sed kun ondetoj, kun la periodo de la planeda orbito ĉirkaŭ la stelo (pli detale tio estas klarigita en la venonta alineo).

- La sepa metodo estas simila al la sesa, sed uzas la ŝanĝojn en la rapideco de la stelo kaŭzitaĵojn pro la gravito de la ĉirkaŭanta planedo. Tamen, montriĝis ke la plej sukcesa metodo ĝis nun estis la sepa, kiun ni priskribos pli detale ĉi sube.

## Malkovro de eksternaj planedoj per la Dopler metodo

En la lasta jardeko astronomoj sukcesis malkovri centojn da planedoj ĉirkaŭ aliaj steloj. Oni tion faris ne per rekta observado de la planedoj, sed per alia metodo, nereakta: analizo de periodaj ŝanĝoj en la frekvenco de spektraj linioj en la lumo de la ĉefa stelo (suno). Por pli bone kompreni tiun metodon necesas klarigi du fizikajn principojn: komuna rivoluado kaj la efiko Dopler.

Ofte steloj aperas en paroj, kiujn la astronomoj nomas “duoblaj steloj” – en tia sistemo la du steloj rivoluas (ĉirkaŭiras) unu la alian, aŭ pli precize, rivoluas ĉirkaŭ la komuna centro de maso. Se la du steloj havas la saman mason, ilia centro de maso troviĝas meze inter ambaŭ, en la sama distanco de ĉiu el la du. Se la du masoj ne estas egalaj, la centro de maso estos pli proksima al la stelo kun la pli granda maso, kaj la orbito de la pli peza stelo estos pli malgranda ol tiu de la alia, malpli peza stelo. Kiam planedo rivoluas stelon, okazas la sama fenomeno, sed ĉar planedoj estas multe pli malgrandaj ol steloj, la centro de maso troviĝas tre proksime al la stelo (suno). Ankaŭ en nia sunsistemo, kiam la Tero rivoluas ĉirkaŭ la Suno, efektive la Suno samtempe rivoluetas ĉirkaŭ la centro de maso de la paro Suno-Tero, kiu troviĝas tre proksime al la centro de la Suno (ĉar la

Suno estas multe pli peza ol la Tero). Sekve la rivoluado de la Suno estas tre malgranda, apenaŭ mezurebla. Simile, planedo de alia stelo kaŭzas etan rivoluadon, do moviĝon, de sia stelo (suno).

La moviĝon de stelo pro rivoluanta planedo oni povas mezuri per la efiko Dopler: la frekvenco aŭ ondolongo de lumo el moviĝanta fonto ŝanĝiĝas pro la moviĝo, simile al la ŝanĝiĝo en la alteco de la sono de moviĝanta fonto de sono (ekzemple la hufado de alpriksimiĝanta trajno aspektas pli alta, kaj ĝi malaltiĝas kiam la trajno preterpasas nin kaj estas malproksimiĝanta).

Laŭ la leĝoj de gravito la stelo, samkiel la planedo, moviĝas en cirkla aŭ elipsa orbito, en perioda maniero. Sekve ĝi alterne proksimiĝas kaj malproksimiĝas de ni. Tio kaŭzas periodajn ŝanĝojn de la frekvenco de linioj en la spektro de la stelo. Observante la spektron de steloj oni povas serĉi tiajn periodajn ŝanĝetojn kiuj indikas la ekziston de planedo aŭ planedoj. Mezurante tiujn ŝanĝojn oni povas kalkuli la orbiton kaj mason de la nevidebla planedo (aldono A).

## Demografio de eksterteraj planedoj

Komence de 2002 oni konis proksimume okdek stelojn kun planedoj. En dek jaroj tiu nombro kreskis al ĉ. 500, kaj nun, post unu jaro da funkciado, la spaca teleskopo “Kepler” malovris pli ol mil novajn kandidatojn, per la eklipas metodo. Gisdatan liston de eksterteraj planedoj eblas trovi en la retadresoj <http://www.obspm.fr/encycl/catalog.html> <http://exoplanets.org/almanacframe.html>

La sukceso pri trovado de eksternaj planedoj povas indiki ke planedoj estas sufiĉe ofta fenomeno. Tamen, preskaŭ ĉiuj planedoj kiujn oni malkovris ĝis nun estas tre diferencaj ol la Tero: ili estas pli ol similaj al Jupitero, kiu estas pli ol dekoble pli granda ol la Tero kaj havas

mason tricentoble pli grandan. La masoj de preskaŭ ĉiuj nuntempe konataj ekstersonaj planedoj troviĝas inter duone kaj dekoble la maso de Jupitero, kaj preskaŭ ĉiuj estas multe pli proksimaj al sia suno ol la distanco inter la Tero kaj la Suno, kaj eĉ inter la Suno kaj Merkuro, la plej proksima planedo de nia sunsistemo. Planedoj tiom grandaj tre verŝajne estas gigantaj gasaj planedoj kiel Jupitero kaj Saturno, kaj je tiel malgranda distanco de sia suno, treege varmaj, do ne tre favoraj kondiĉoj por vivo laŭ niaj kriterioj. Ĉu tio indikas ke nia sunsistemo kaj Tero tamen estas unikaj rilate la mason kaj la distancon de la suno, kaj sekve la kondiĉojn por evoluo de vivo? La respondo estas ke ne. Ekzistas tre simpla klarigo por la grandaj masoj de la malkovritaj ekstersonaj planedoj kaj por ilia proksimeco al sia suno. Ju pli granda la planedo, kaj ju pli proksima ĝi estas al sia suno, des pli granda la gravita forto kaj la perioda ŝango en la rapideco de la stelo. Nuntempe, oni ne povas mezuri rapidecŝanĝojn malpli grandajn ol kelkdekoj da metroj sekunde. Por ke stelo simila al la suno havu tiomajn rapidecŝanĝojn, estas bezonata planedo kun la maso de Jupitero kaj je distanco de la stelo malpli granda ol estas la distanco inter Tero kaj nia Suno. Planedoj pli malgrandaj aŭ pli malproksimaj, se sia suno kaŭzus rapidecojn malpli grandajn, do nemezureblajn per la nuna teknologio. La manko de ekstersonaj planedoj similaj al la Tero estas do rezulto de la teknologia limigo de la metodo kaj de niaj iloj, kaj ne respegulas veran mankon de tiaj planedoj. Efektive kelkaj planedoj kun masoj kompareblaj al Tero estis malkovritaj per alia metodo (ĉirkaŭ pulsaroj). Kiel povas esti ke ĉiuj ekstersonaj planedoj, kiuj estas similaj al la gigantaj planedoj de nia sunsistemo, troviĝas je distancoj multe pli malgrandaj? La astronomoj klarigas tion per la teorio de planeda migrado: la gigantaj planedoj evoluas el

la prastela gasa disko je granda distanco (efektive estas indikoj ke ankaŭ Jupitero mem evoluis je distanco pli granda ol la nuna) kaj la gravita influo de la materialo en la praaj ĉirkaŭstela materio malrapidigas la rivoluon de la planedo ĉirkaŭ sia stelo, kaj sekve pelas ĝin al orbito kun pli malgranda diametro.

## Estontaj misioj: serĉi terecajn ekstersonajn planedojn

Ĝis la lastaj jaroj la teknologio povis malkovri nur gigantajn planedojn, similajn al Jupitero. Ĉu eblas estonte observi ekstersonajn planedojn similajn al la Tero? Per la Dopler metodo ni povas nuntempe malkovri rapidecŝanĝojn de minimume kelkaj metroj per sekundo. La rapidecŝanĝojn kaŭzatajn al la Suno pro la Tero estas nur unu centimetro per sekundo – multe tro malgrandaj por nia nuna kapablo. Por malkovri terecajn planedojn ni bezonas multe pli akuratajn observojn, eblaj nur el la spaco, kie la atmosfero ne limigas la kapablojn de la teleskopoj. Kelkaj tiaj spacmisioj estas planataj por la proksimaj jardekoj.

Pasintjare NASA lanĉis satelitan teleskopon nomata **Kepler** por observi tranzitojn de terecaj planedoj je sia suno. Estontaj misioj celos rekte observi ekstersonajn planedojn per tekniko nomata interferometrio. Tiu metodo kombinas la bildojn de pluraj teleskopoj kiuj troviĝas en certa distanco unu de la alia por akiri la efikon de sola teleskopo kun spegulo tiel granda kiel la distanco inter la individuaj teleskopoj. Unu misio nomata SIM (Spaca Interferometria Misio) konsistas el grupo de pluraj teleskopoj en orbito ĉirkaŭ la Suno. SIM povos rekte observi planedojn je grandeco de Jupitero, sed ne de la Tero. Por rekte observi terecajn planedojn estos bezonata pli potenca interferometra teleskoparo en

orbito pli malproksima de la Suno ol la Tero – por eviti la polvon kiu troviĝas pli proksime al la Suno. Estis planataj du tiaj misioj: TPF (Tereca Planedo Trovanto) de NASA kaj Darwin de la Eŭropa Spac-Agentejo (ESA). La avantaĝo de rekta observado de planedoj estas ke ĝi ebligas ankaŭ spektran analizon de ĝia atmosfero, por konstati ekzemple ĉu ĝi enhavas elementojn bezonatajn por evoluo de vivo, kiel akvovaporo, aŭ efektive indikantajn tian evoluon, kiel oksigeno. Tio povas fine doni rektan respondon al la demando ĉu vivo troveblas aliloke ekster la Tero.

## Konkludo

La demandoj, ĉu ekzistas ekster la Tero aliaj civilizacioj, eventuale multe pli evoluigintaj ol la nia, kaj ĉu ni povas ilin malkovri kaj komuniki kun ili, ankoraŭ ne havas respondon. Ni daŭre ne scias ĉu en nia Galaksio ekzistas multaj aliaj civilizacioj, ĉu malmultaj aŭ ĉu ni estas la sola. Tamen gravan demadon tiurilatan ni sukcesis solvi en la lastaj jaroj: kiom oftaj estas planedaj sistemoj kaj aparte terecaj planedoj. Ni trovis ke tiaj planedoj certe ne estas raraj, kio proksimigas nin al la solvo de unu el la plej grandaj misteroj de la Kosmo: Ĉu ni estas solaj?

## Bibliografio

- "An Introduction to Astrobiology", red. I. Gilmour kaj M. A. Sephton, 2004, Cambridge University Press.
- Wandel, A.: "Ĉu ni estas solaj?", Internacia Kongresa Universitato, 1998, (red. A. Wandel), Montpeliero, Francio, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 88 p.
- Wandel, A. kaj Galadi-Enriquez, D.: "La Kosmo kaj Ni", FEL, 2001, dua eld. 2005
- Wandel, A.: "Sunsistemoj kaj planedoj ĉirkaŭ foraj steloj", Astronomia Almanko, 2003, red. Aleks Mikiŝev.
- Wandel, A.: "SETI post 50 jaroj - astrobiologio



kaj la serĉado de ekstertera inteligenteco", en: A. Wandel (red.), Internacia Kongresa Universitato 64-a Sesio. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2011, paĝoj 4-16

## Aldono

### Kalkulo de Maso kaj Orbitaj trajtoj de Ekstersunaj Planedoj

La daŭro de unu periodo egalas al la daŭro de revolucio de la planedo ĉirkaŭ sia suno (en la kazo de nia Tero tio estas unu jaro). De la periodo ( $P$ ) kaj rapideco ( $v$ ) de la stela moviĝado oni povas kalkuli la distancon inter la stelo kaj la planedo, kaj la mason. Matematike oni tion faras per solvado de tri ekvacioj:

- La rilato inter periodo kaj orbito - por cirkla orbito:

$$2\pi R_s = vP$$

- La ekvacio de la centro de maso

$$M_s R_s = M_p R_p$$

kie  $R_s$  kaj  $R_p$  estas la radiusoj de la stela kaj planeda orbito,

respektive, kaj  $M_s$  kaj  $M_p$  iliaj respektivaj masoj.

- La dua leĝo de Kepler:

$$M_s + M_p = 4\pi^2 R^3 / GP^2$$

kie  $R = R_s + R_p$ .

Ĉar la stelo estas multe pli peza ol la planedo, oni povas plisimpigi la trian ekvacion: proksimume validas  $M_s + M_p \sim M_s$  kaj  $R \sim R_p$ . Se aldone  $M$  estas mezurata per sunaj mas-unuoj,  $R$  per astronomiaj unuoj (aŭ, la distanco inter Tero kaj la Suno) kaj  $P$  per jaroj, la tria ekvacio fariĝas

$$M_s \sim R_p^3 / P^2$$

La datumojn  $P$  kaj  $v$  oni determinas el la observado de la Doppler efekto kaj sekve la grandecon de  $R_s$  oni kalkulas el ekvacio 1.

Se oni povas sen-depense taksu la mason de la stelo (ekzemple se ĝi estas stelo el la ĉefa sekvenco per la spektra tipo kaj la maso-lumeco rilato) eblas kalkuli la radiuson de la planeda orbito  $R_p$  (el la simpligita ekvacio 3) kaj la planedan mason  $M_p$  (el ekvacio 2).

En la realeco la bildo estas iomete pli komplika:

Unue, la orbitoj de la stelo kaj la planedo kutime ne estas cirkla sed elipsaj, kaj due, ili plej ofte ne estas paralelaj sed klinitaj al nia vid-linio per iu angulo  $i$ .

Per la Doppler metodo oni povas mezuri nur la rapidecon en la direkto de la vid-linio (do nur proksimiĝanta al ni aŭ male), tiel ke la rapideco kiun ni mezuras estas efektive  $v \sin(i)$ , kaj sekve la maso kalkulita estas  $M \sin(i)$ , do pli malgranda ol la vera maso.

La unua komplikajo (elipso anstataŭ cirklo) kaŭzas ke la ŝanĝoj de la stela rapideco kun la tempo ne aspektu kiel sinuso sed iom tordita, nesimetria sinuso. De la preciza formo eblas kalkuli kiom "mallarĝa" estas la elipso, trajto mezurata per la "ekscentreco"

$$e = \sqrt{1 - b^2/a^2}$$

kie  $a$  kaj  $b$  estas la granda kaj malgranda duon-aksoj de la elipso. Elipso kun egalaj  $a$  kaj  $b$  (kiu estas do cirklo) havas  $e=0$ . En la ekvacioj ĉi supre la radiuso  $R$  devas esti anstataŭita per la granda duonakso  $a$ .

## IDEO POR INFANOJ KAJ GEPATROJ!

*Ljubica Sedmak*

En mia najbareco somerumis slovenino, kiu parolis al mi pri sia infano. Kun la vartistinoj el la infanĝardeno, ŝia infano ekskursis al Kranjska Gora. Tia ekskurso estis kutima por ĉiuj infanĝardenoj kaj elementaj lernejoj en Slovenio. En arbaro apud Kranjska Gora ekzistas "Vilaĝo de Kekec", en kiu vivas aktoroj: Kekec, Bedanec ... kaj ĉiuj aliaj el la rakontoj pri Kekec.

Mi ekhavis ideon pri simila ekskurso al "Muelejo de Petro Nodeto". Ne estus necesaj aktoroj, sed la rolojn el "La kamaradaro de Petro Nodeto" plenumus gastoj-vizitantoj. La organizanto anticipu interkonsentus pri ĉies rolo. Knaboj haku donarbedojn aŭ disportus gruzon sur piedvojoj,

aŭ ŝovelus kanaletojn, aŭ plantus ĉerizarbojn, pomarbojn, ribarbedojn, fragojn ... Urbaj knaboj tie povus vidi melkadon de bovino, ili povus trinki freŝan lakton (lakto ne estas fabrikata produkto!), observus porkojn, anserojn kaj ranojn, ili kaptus fiŝojn, lernus bruligi fajron, lernus malnovajn ludojn kaj kantojn sen mikrofono kaj amplifilo ... kaj ili lernus Esperanton! En tiun rezervejon estus malpermesite enporti poŝtelefonojn kaj komputilludojn kaj similajn ĉiutagaĵojn. Estus malpermesate enporti ankaŭ ian ajn nutraĵon kaj trinkaĵon! Tie oni trinkus nur akvon el barelo (el puto aŭ el fonto). Post laboro, kiam ili malsatiĝus, kuiristino donus al ili lakton aŭ acidan lakton, kuiritajn ovojn (kun ŝelo), terpomojn rostitajn en varma cindro kaj mielon anstataŭ aliaj dolĉaĵoj. Ĉiu knabo ricevus "Dipomon por kunlaboro kun Petro Nodeto", kaj la Esperanten tradukita libro povus esti ponto por amikeco kun knaboj el Hungario kaj Aŭstrio. Knaboj ankaŭ ricevu flugfoliojn por siaj gepatroj kaj geparencoj, amikoj kaj najbaroj, kiuj estus invito al Esperantaj kursoj por knaboj kaj plenkreskuloj.



*“Ekde la jaro 1960 komenciĝis la rapida evoluo de Primošteno. Studentoj el Zagrebo (el la tiea Observatorio) kaj esperantistoj malkovris Primoštenon. Konstruiĝas la Esperanto-kampadejo kaj dum somero alvenadis esperantistoj el la tuta mondo.”*

Pri la evoluo de turismo en Primošteno, tiu perlo de Adriatiko, nuntempe per la ĉi-supraj vortoj informas la oficiala retejo de Komunumo Primošteno. Kvankam el tiu pionira tempo de turismo kaj el la idealisma laboro de la esperantistoj nuntempe restis malmultaj suproj en Primošteno, la urbo mem staras en la pinto de la kroata turismo. Kaze de via alveno al Kroatio, nepre vizitu ĝin.



# PRIMOŠTEN



*Zagreba Esperantisto*





## Ho Primoŝten'

*Ho Primoŝten', ho Primoŝten'  
vi vilaĝet' ĉemara,  
por ni eden' kaj ĝojhaven',  
juvel' sub ĉielo klara!*

*Ni amas vin, ja tie kor'  
renkontis koron aman,  
Kaj ĝojo, gajo kaj humor'  
parolas lingvon saman.*

*Vi ravas nin,  
ni laŭdas vin  
pro via ĉarm' natura,  
pro la zefir' susura,  
piniodoro pura  
kaj mara ond' lazura.*

*Ĉi tie same langas vort'  
per flua Esperanto  
kaj ŝvelas la idea fort'  
de ĉiu pacamanto.*

*Vi estas ĉel' de Nova Mond'  
pli hela kaj pacema,  
Ĝestas vi la Liga Pont'  
al la homar' senĉena!*



# LA KRISTNASKA STELO

 Nicola Morandi

Dum kristnaska peri-odo, en multaj sciencaj kaj nesciencaj revuoj, estas kutime trovi artikolojn, kiuj pritraktas la kristnaskan stelon, la faman stelon, kiu gvidis la tri Magojn de oriento ĝis la groto, en kiu naskiĝis Jesuo.

La originala rakonto pri tio troviĝas en la evangelio de Mateo. En la aliaj evangelioj, ĉi tiu evento ne estas menciita.

La rakonto diras, ke la Magoj sekvis “la stelon”, kiu “antaŭiris ilin, ĝis ĝi alvenis kaj haltis super la loko, en kiu troviĝis la infano”.

Bedaŭrinde, la rakonto estas tre mallonga kaj malpreciza.

Kio estis la stelo kiun la Magoj vidis okcidente, ĉar ili venis de oriento, t.e. de Persio?

Cu novao? Supernovao? Verŝajne ne.

La diligentaj kaj precizegaj antikvaj astronomoj el Ĉinio, Japanio kaj Koreo notis nenion en siaj dokumentoj tiurilate dum tiu periodo.

Krome, hodiaoni trovas neniun restaĵon (nebulozon, pulsaron a nigran truon) de ia fenomeno okazinta antaŭ du mil jaroj, kiu tiam povis esti observita proksime al la okcidenta horizonto.

Du cent jarojn post Kristo, la teologo Origene hipotezis, ke la betlehema stelo estis kometo, sed ankaŭ pri ĉi tiu opinio oni povas konkludi sammaniere: kial en la astronomiaj dokumentoj de la ekstremorientaj civilizacioj ekzistas nenio pri tio?

Krome, oni devas ankaŭ konsideri, ke dum la tempoj en kiuj la eventoj okazis, la kometoj estis konsiderataj aŭgurantoj de la malbono, tutcerte ne heroldoj de la dia gloro.

Poste estis konsiderata la hipotezo pri konjunkcio de planedoj, fenomenoj kiuj dum la antikvaj tempoj havis grandan atenton.

Ni jam diris, ke Mateo parolas pri ununura stelo (“aster” en la antikva greka lingvo) tamen dum la 2-a jaro a. K., estis tre edistanca konjunkcio de Jupitero kaj Venuso super la okcidenta horizonto, okazinta en la konstelacio Leono, kiu krome tiutempe reprezentis Judeon.

Kelkaj sciencistoj, ĉer-pante el aliaj fontoj opinias, ke la konstelacio kiu reprezentis Judeon estis Fiŝoj.

Aliaj pensas pri Arieso, kaj iuj pri Virgo.

Dum tiuj jaroj ankaŭ aliaj konjunkcioj okazis en tiu ĉiela zono: ekzemple dum la 7-a jaro a. K. en Fiŝoj okazis konjunkcio de Jupitero kaj Saturno; dum la 6-a jaro estis grava konjunkcio de Venuso, Saturno, Luno kaj Jupitero en la konstelacio Arieso.

Bedaŭrinde, la unua okazis super la orienta-sudorienta horizonto, la dua super la orienta horizonto.

Pro tio kun tiuj astronomiaj eventoj ne



bone akordiĝas la rakonto de Mateo.

Kelkaj kleruloj konsideris kiel kristnaskan stelon la kaŝon de Jupitero far Luno, okazinta dum la 6-a jaro a. K., sed aliaj ne konsentas opiniante, ke dum tiu periodo tia evento estus interpretita kiel la anonco de la forpaso de iu reĝo, sed ne kiel lia naskiĝo.

Laŭ la astronomia vidpunkto, la problemo estas tute neklarigebla. Tamen kelkajn konkludojn oni povas atingi: ni jam diris, ke nur en unu evangelio troviĝas la rakonto pri la Magoj gviditaj de stelo, kaj serĉantaj ĵusnaskitan reĝon.

Cu ne povus esti, ke Mateo, por pli bone glorigi nian Sinjoron, ĉerpis inspiron el la multaj mitoj de la antikvaj tempoj, kiuj ofte rakontas, ke venonta granda reĝo devas esti naskita de virga patrino, anoncita de mirakla stelo kaj dum la regado de potenca kaj malbona reĝo, kiu klopodas sensukcese mortigi lin dume li estas ankoraŭ malgranda infano, por eviti ke li, fariĝonte plenkreskulo, detronigu lin?

Cu ne okazis preskaŭ same pri Mitrao, aŭ la greka heroo Perseo?

Cu ne la historioj pri Zeŭso, Edipo, Romulo, aŭ pri la plene historia Aleksandro la Granda ne tre similas la eventon priskribitan en la evangelio de Mateo?

Verŝajne multaj scien-cistoj senutile klopodegas serĉi konkretecon en la rakonto, kiu eble estas nur simbolvalora, kaj kiu tute perdis aŭ akirus nenion, ankaŭ se oni sukcesus meti ĝin en realan kaj koheran kadron.

Tamen, ni ne povas nei, ke la klopodoj por sukcesi en tio, havigas ĉiam tre interesajn sciencajn kaj kulturajn konsiderojn.

Bonan Kristnaskon kaj feliĉan novan jaron al ĉiuj.

# LA DISKONTINUECO DE MOHOROVIČIĆ

 Radenko Milošević

Tiu ĉi teksto pri Andrija Mohorovičić estas la lasta pri la kroata scienca triopo laŭ la propono de UNESKO por ĉi-jaraj mondaj jubileuloj. Eble li ne estas tiom konata inter ni, kiom la aliaj du – Josip Ruder Bošković kaj Markantun de Dominis, sed ili apartenas al pli fruaj jarcentoj kaj ili estis multflankaj, monde konataj sciencistoj devenantaj el Kroatio. Andrija Mohorovičić tamen, komence de la 20-a jarcento estis granda sciencisto, kies laborkampo estis geofiziko – sismologio kaj meteologio.

La jubileo rilatas lian malkovron el la jaro 1910, per kiu li konstatis, ke la Tero ne estas homogena, sed ke en ĝia profundo ekzistas la limo inter la terkrusto kaj la supera tervolvajo t.e. tera supraĵo. Tio signifis diskontinuecon de dikeco de la terkrusto, kio rezultigas diferencon en rapideco de tertremo-ondoj. Tiu ĉi tavolo disigas la terkruston de la tera volvaĵo, nomita al lia honoro – la Diskontinueco de Mohorovičić, aŭ mallonge MOHO.

La elstara sciencisto en la kampoj pri sismologio kaj meteologio Andrija Mohorovičić naskiĝis apud Opatija en la jaro 1857. Lia edukado estis kutima por kroataj sciencistoj kaj artistoj de tiu tempo, ĉar la bazan lernejon li finis en sia

naskiĝurbo, gimnazon en Rijeka kaj poste studis matematikon kaj fizikon ĉe la Filozofia fakultato en Prago. Post la finita studado li prelegis en Zagrebo, Osijek kaj ĉe la Naŭtika lernejo en Bakar. Laŭ propra peto li posteniĝis en 1891 en la reala gimnazio en Zagrebo kaj en 1892 li fariĝis direktoro de Meteologia observatorio en Zagrebo. Unu jaron post la alveno al Zagrebo, li doktoriĝis kaj fariĝis universitata profesoro, prelegante geofizikon kaj astronomion ĉe la Filozofia fakultato ĝis la studjaro 1917/1918. Agnosko de lia grandega scienca laboro estis rapide pruvita kaj li iĝis membro de la tiama Jugoslavia akademio pri sciencoj kaj artoj en Zagrebo, kie li funkciis kiel sekretario de Matematika-naturscienca fakultato de la Akademio ĝis la jaro 1922. Li forpasis en 1936 kaj estis enterigita en Zagrebo.


La scienca laboro de Mohorovičić komenciĝis jam en la Naŭtika lernejo en Bakar, kie li prelegis meteologion, fondis meteologian stacion kaj

konstruis mezurilon por observi moviĝon de nuboj, la tielnomatan nefoskopon. Ekokupinte la direktoran postenon en la Meteologia observatorio, li samtempe gvidis la meteologian servon de tiama Kroatio kaj Slavonio. Li pristudis malkreskon de atmosfera temperaturo post ĝia plialtiĝo. Komence de 1893 Mohorovičić organizis reton de stacioj por observado de tempestoj kun tondrado. La sciencisto Mohorovičić jam tiam, en 1899, antaŭvidis la eblecon uzi venton por plibonigi la vivon en "nia karsta kaj dezerta marborda regiono".

Komence de la 20-a jarcento la scienca intereso de Mohorovičić direktiĝis al problemoj de sismologio. Honore al Mohorovičić, en la jaro 1996, la asteroido sub la numero 8422 ricevis la nomon - 8422 Mohorovicic. Ni menciuj, ke Kroatia poŝto eldonis poŝtmarkon

## Skemo de la Tera internaĵo:

1. Kontinenta krusto
  2. Oceana krusto
  3. Supera tavolo
  4. Malsupera tavolo
  5. Ekstera kerno
  6. Interna kerno
- A. Diskontinueco  
B. Diskontinueco de Gutenberg  
C. Diskontinueco de Lehman



okaze de la 150-jara jubileo post lia naskiĝo, pri kio ni skribis en "Zagreba Esperantisto", n-ro 3, el la jaro 2007.

### Diskontinueco de Mohorovičić

La kerna scienca laboro de Andrija Mohorovičić estis analizo de tertremaj ondoj. Analizinta la tertremon en la komunumo Pokupsko, en la Zagreba regiono en la jaro 1909, Mohorovičić kiel la unua en la mondo malkovris la mekanismon de etendiĝo de tertremaj ondoj tra la terkrusto, konkludinta ke ekzistas ia diskontinueca tavolo kiu dividas la terkruston disde la tervolvajo, kaj kaŭzas diversan tertreman rapidecon.

Menciendas, ke la supera tertavolo estas dika krusto konsistanta el densaj rokoj kiuj ĉirkaŭas la eksteran kernon, kaj situas rekte sub la relative maldika terkrusto. La limo inter la terkrusto kaj la supera tervolvajo nomiĝas Diskontinueco de

Mohorovičić (aŭ mallonge *Moho*), ĉar ĝin malkovris la kroata sismologo Andrija Mohorovičić en la jaro 1910. La oceana terkrusto havas averaĝan dikecon de 6 km, kaj la kontinenta terkrusto de 35 ĝis 75 km (plej dika ĝi estas sub la plej altaj montoj), do la profundo de *Moho* varias konsekvence. La diskontinueco manifestiĝas per plirapidiĝo de la tertremaj ondoj, la rapideco de la P-ondoj pasas de 7 al 8 km/s. La kialo de tiu plirapiiĝo estas ecaj ŝanĝoj de la propaga medio, estiganta refrakton: la kontinenta krusto konsistas, kiel jam estis menciite, ĉefe el granitoj, la oceana krusto el bazalto, dum la tervolvajo konsistas el peridotitoj. Do tiu fenomeno estas fizika-kemia diskontinueco.

Multaj sciencistoj konfirmas malkovron de diskontinueco de Mohorovičić en diversaj regionoj. En Kroatio estis pruvite, ke la profundo de diskontinueco sub la Dinaridaj montoj estas ĉirkaŭ 40 kilometroj sed iom post iom ĝi malpligrandiĝas ĝis la

profundeco de 25 kilometroj en la regiono de Podravina.

Por esplori la fenomenon de diskontinueco, inter la jaroj 1960 kaj 1989 oni boris por atingi Mohon, kaj en la duoninsulo Kola (granda duoninsulo en la nordokcidenta parto de Rusio, en la regiono de Murmansk, kiu etendiĝas sur 300 x 400 kilometroj inter la Blanka kaj la Barentsa maroj), estis atingita la profundo de ĉirkaŭ 12 kilometroj. Atingi diskontinuecon fariĝis interesa celo, kaj de antaŭ nelonge oni intencas konstrui specialan varmigitan kapsulon por povi esplori la ĉirkaŭaĵon de Moho-tavolo.

En la procedo de la malkovro de diskontinueco de rapideco Mohorovičić supozis ke rapideco de tertremaj ondoj en la terkrusto iompostome pligrandiĝas kiam la ondoj eniras en pli grandan profundecon. Tiun leĝon li esprimis per eksponenta funkcio, kiu estis nomita la leĝo de Mohorovičić kaj aplikata eĉ nuntempe.


## ŽELJKO SABOL, LA FAMA KROATA POETO, ESTIS ANKAŬ ESPERANTISTO

*Zdenka Polašek*

La 28-an de novembro ĉiujare, la literatura publiko de Kroatio rememoras pri la naskiĝdatreveno de la fama kaj mondkonata poeto, arthistoriisto kaj eseisto Željko Sabol. En 2011 ni rememoris pri la 70-a datreveno de lia naskiĝo, aparte en lia naskiĝurbo Bjelovar, per okazaj ekspozicioj, prelegoj, recitadoj kaj koncertoj de liaj kanzonoj, kaj la Urba biblioteko okaze de la ekspozicio "Antologiaj poemoj de Željko Sabol", eldonis ankaŭ la samnoman kajeron. Ni rememoris ankaŭ pri la 20-a datreveno de la poeta morto. La lirika animo de homamanto kaj ŝatanto de vero kaj libereco, ne povis elteni la agresadon al Kroatio, kaj la 5-an de septembro 1991 li faris suicidon.

Željko Sabol per sia vivoverko (25 antologiaj poemoj) ŝuldigis nin ĉiujn, kaj li meritas apartan prezenton de sia verkaro kaj kreado.

Jen kelkaj miaj rememoroj el la tagoj de nia junaĝo, el la tempo de forta Esperanto-movado



en Bjelovar. Signante la datrevenon de lia naskiĝo, ni rememoru pri lia feliĉa junaĝo. La 28-an de novembro 1941, liaj gepatroj Marija kaj ĉuro Sabol ricevis la filon Željko. Li plenkreskiĝis, kaj la tutan vivon travivis kiel Bjelovarano en la naskiĝstrato Julija Haulika, kiun la loĝantoj de Bjelovar cetere nomas "La strato de artistoj". En tiu strato, krom Željko, vivis ankaŭ la pentristo Ivo Frišćić, kaj samstrate ankaŭ hodiaŭ vivas la fama grafikisto kaj pentristo Krešimir Ivanček.

La domo en kiu naskiĝis Željko Sabol estis la konstruaĵo entirita en la korton kun belega ĝardeno antaŭ ĝi, pri kiu zorgis la patrino de Željko. La ĝardeno estis plenplena je floroj, kaj la patrino tre fieris pro ĝi. Ankaŭ post la serioza malsaniĝo de la patrino, sinjorino el la najbareco fleganta ŝin, zorgis ankaŭ pri la floriĝo per la sama amo kiel la patrino de Željko mem. Pro tio la floriĝo konservis plenan buntecon kaj unikan belecon.

Antaŭ la domo Željko pasigadis multajn horojn kaj kun nostalgio, kaj en sia poemo *Mi ne scias* li estas kvazaŭ observanto de la floriĝo de kiu prognozias ĝian aspekton en la estonteco:

*"Mi en scias  
kiu ankoraŭ pri mia ĝardeno pensos  
kiam miaj patro kaj patrino ne plu estos  
en la krepusko, sidantaj antaŭ la domo, mi pensas  
surstrate voĉo de ludoj infanaj  
densa herbaro ĉi tiu ĝardeno iam superkreskos..."*

La abundecon de floroj en la ĝardeno povas rememori nur pli aĝaj bjelovaranoj, kiuj pasadis preter la domo kiam la kortopordo estis malfermita. Post la morto de Željko, bedaŭrinde, la alstrata muro

antaŭ la ĝardeno estis detruita, kaj tiuloke elkreskis loĝdomo kiu poreterne forviŝis la unikan belecon ...

Kiam oni diras lian nomon, ĉiuj scias kiu estis Željko Sabol. Oni konas lin kiel talentitan poeton, kaj aparte kiel aŭtoron de muzikigitaj tekstoj. Sed li ankaŭ isntigis la junularon verki poezion, okupiĝi pri pentrista kreado. Tamen, maloftaj scias, ke en sia junaĝo estis ankaŭ adepto de Esperanto, sed lia mallonga vivo ne permesis al li eluzi la eblecojn en la poezia senco.

Li kreskis en modesta kaj honesta familio. Lia parino estis dommastrino, kaj la patro ŝuisto, multjara aktiva bjelovara esperantisto, de kiu Željko heredis sian intereson pri Esperanto, sed ankaŭ ĝenerale pri ĉiuj homoj de la mondo, senkonsidere pri ilia haŭtkoloro, raso, religio aŭ nacieco.

Konsiderindan parton de sia junaĝo (dum la frekventado de elementa lernejo kaj gimnazio), li deidiĉis al la aktivado en la Esperanto-societo de Bjelovar, samtempe okupiĝante pri la lernejoj taskoj kaj pri sia ĉefa interesokampo - poezio. Per nenio aparte li elstaradis, sed la tutan vivon li estis modestulo, sinforĝesa, samkiel plimulto de tiamaj junaj esperantistoj en Bjelovar. Anstataŭ li parolis liaj rezultoj. Li gvidis kursojn, preparadis prelegojn, verkis artikolojn pri Esperanto, partoprenis en ĉiuj aktivecoj de la societo.

La gepatroj lin edukis kun multe da amo, kaj li scipovis danki al ili sammezure, kiel tio videblas en la belega poemo "Fingroringo de mia morta patrino". Multaj aferoj el la vivo de Željko Sabol restis neeldiritaj. Ĉi tiu artikolo estu invito al la legantoj konintaj nian amikon Željkon, ke ili priskribu siajn memorojn pri li.



**Željko Sabol  
kiel membro de  
Esperanto-societo en  
Bjelovar (li staras la  
dua de dekstre en la  
malantaŭa vico).**

**Željko Sabol:**

## FINGRORINGO DE MIA MORTA PATRINO

(Prsten s ruke moje mrtve majke)

*Dediĉita al Dragutin Tadijanović*

Familia kaj propra nomoj: SABOL MARIJA

Dato kaj jaro de naskiĝo: 1909

Diagnozo per ĉifro: 440/VII Athero. gen.

Myocardiopathia chr. Fibrilatio atriorum. Cor. decomp.

Stato ĉe la elhospitaliĝo: mortis

Oni transdonis ĝin al mi en la hospitalo lundon, la 16-an de julio 1990  
je la naŭa horo matene  
kune kun la mansaketo el nigra ledo  
kaj aliaj bagaĉaĵoj  
kiuj en ĝi troviĝis.

Ora fingroringo  
kun ornamajoj vinberformaj  
kun alkroĉita blua safiro.

Ŝi ricevis ĝin

tiel ŝi rakontis

de sia patrino

kiam ŝi edziniĝis

al mia patro Georgo

en Dobrinj sur Krk

en la jaro 1927.

Nun mi gardas ĝin

surfunde de skatolo el blua veluro

en kiu mi foje

en Zagrebo

aĉetis kristalan vazon.

Eta fingroringo

surfunde de lazura skatolo

sur fundo de lazura, tute lazura

sepulitejo.

*Tradukis: Josip Pleadin*

Gézan mi ekkonis antaŭ du jaroj, enirinte en la redakcion de **Juna Amiko**. Dank' al li mi sendolore trapasis la adaptan periodon inter la spertaj teamanoj de profesiuloj, kio estas malfacila por ĉiu novulo. Géza montris al mi ne nur por kio servas la laboro en la redakcio de **Juna Amiko**, sed antaŭ ĉio en kio kuŝas ĝia senco. Mi havis la eblecon observi la homon, kiu ne nur estas fidela al belaj vivvaloroj, sed kiu scipovas realigi ilin.

Kiam en unu el siaj leteroj al mi li skribis: "Mi estas libera homo, kiu antaŭ unu semajno finis la redaktadon de JA", mi decidis peti lin pri intervjuo, por ke ankaŭ aliaj personoj ekkonu tiun modestan kaj simplan homon, kiu neniam havis ambiciojn pri iu ajn honoro kaj distingigis per neniu ekstera, videbla eco en la socio. Nur ekkonante lin pli profunde, oni rimarkas liajn fortajn volon, animon kaj karakteron, kaj tiam oni konvinkiĝas kiel ege li estas al ni bezonata.

★ **Geza, mi gratulas al vi la distingon de UEA. Ĉu vi memoras komencojn de via redaktado de la revuo? Kio kaŭzis, ke vi fondis la revuon Juna Amiko kaj kial ĝi havas tian titolon?**

- En 1962 ekinstruante en mezgrada lernejo, mi tuj varbis tie geknabojn kaj instruis Esperanton en fakrondo. Post kelkajara instruado mi pli kaj pli sentis mankon de facillingva periodaĵo, kiu povus esti fenestro al la tuta mondo. La iama gazeto "La Juna Vivo" eldonata en Belgio jam delonge ne ekzistis, kaj tiutempe ĉesis aperi "La Praktiko", kiu liveris interesajn legaĵojn por komencantoj. Fine, pro manko de konvena materialo en 1972 mi turnis min al la tiama estraro de ILEI kun propono pri revuo por lernejanaj kaj komencantoj. La estraro akceptis la proponon kaj petis min realigi la ideon kun la helpo de Hungara Esperanto-Asocio. La revuo ricevis sian titolon "Juna Amiko" de iu estrarano de HEA (certe sub la influo de "La Juna Vivo").

## KIEL MI EKLERNIS ESPERANTON

*Zlata Nanić*

Unufoje mi legis pri Esperanto en infangazeto **Radost** en la oka klaso de elementa lernejo. En la artikolo estis skribite, ke Esperanto estas internacia lingvo, tre simpla por lerni. Mi tuj ekdeziris lerni tiun lingvon, sed en Grubišno Polje kie mi frekventis la elementan lernejon, neniu konis Esperanton. Jaron poste mi ekfrekventis la Gimnazion en Bjelovar. Mia klaskolego Željko Sabol jam konis Esperanton, kaj de li mi eksciis kie kaj kiam mi povas lerni ĝin. Sinjoro Viliam Polašek, aktivulo de Esperanto-societo en Bjelovar, organizis kursojn por gelernantoj, kaj en la lernojaro 1956/1957 ankaŭ mi fariĝis lernantino de Esperanto. Tiutempe la klaskolego Željko jam tre bone regis la lingvon, kaj verkis en ĝi eĉ kelkajn poemojn. Krom li, ankaŭ mia klaskolegino Mirjana Prpić estis esperantistino. Nuntempe, kiam jam dudek jarojn Željko ne estas kun ni, mi estas tre fiera ke dum kvar jaroj li estis mia klaskolego.

# GRANDA MODESTA SIMPLA HOMO GÉZA KURUCZ



*✍* Małgosia Komarnicka

*Géza Kurucz estas kunfondinto de la konata revuo "Juna Amiko" kaj ĝia multjara redaktoro. Ĉi-jare li decidis retirigi el tiu posteno kaj emeritiĝi. Bele kronita estas lia laboro per la ĉi-jara distingo, kiun pro lia modela redaktado de la revuo, aljuĝis al li UEA, proklamante novajn Honorajn Membrojn kaj Premiitojn.*

★ *Juna Amiko* estas certe por vi kiel infano. Kion vi sentas forlasante ĝian redaktadon, kaj kia devus esti via posteulo?

- Dum jardekoj ni sendube firme interligiĝis, tamen forlasante la redaktan laboron mi sentas nenian korporemon ĉar mi konscias, ke la revuo, se ĝi deziras resti moderna kaj aktuala, bezonas novan aktivulon el la pli juna generacio. Por mi gravas la estonteco de "Juna Amiko" kaj ne mia animstato.

★ **Kio por vi estas amikeco?**

- Sincera homa interrilato kaj helpemo, respekto.

★ **Kiel aŭtorino de la rubriko "Legu kaj Ĝuu" en "Juna Amiko", en kiu mi provas veki ŝaton al libroj, ĉar legado estas unika investo, kiu alportas nur gajnon, mi devas starigi al vi jenan demandon: Ĉu vi opinias, ke nuntempe oni sufiĉe legas?**

- Tute certe ne. Necesas aktive bremsi tiun tendencon. Aliflanke ni devas konscii pri tio, ke novaj direktoj neniam estis kaj estos haltigeblaj. Kion fari do? Postuli efektivan valoron. Gravus ne la formo, sed la enhavo. En iu ajn formo de arto oni povas krei alt- kaj senvalorajn.

★ **Esperanto ne nur ŝanĝis, sed ankaŭ donis al mi novan vivon kaj tial mi ĉiam estas scivola ĉu ĝi ankaŭ influas vivon de aliaj personoj. Kial vi komencis lerni Esperanton? Ĉu ĝi ŝanĝis vian vivon?**

- Sendube. Tio estis unu el la plej gravaj okazintaĵoj en mia vivo. La ideo de Zamenhof kaptis mian koron kaj por ĉiam katenis min al internaciismo kaj demokratio. Kun la lingvo mi konatiĝis tute hazarde. Post la abiturienta ekzameno kaj sensukcesa

priakcepta ekzameno en la altlernejo de teatra arto mi eklaboris kiel kulisisto en la fama teatro Madách de Budapeŝto, ĉar mi deziris fariĝi reĝisoro. En liberaj posttagmezaj horoj mi vizitis bibliotekon kaj tute hazarde tie, pro simpla scivolemo, prenis lernolibron de Esperanto. Legante ĝin, mi fariĝis pli kaj pli ravita, ĉar la simpleco de la gramatiko kaj la internacia vortrezoro kun la senescepta afiksaro katenis min, kiu ĝis tiam ne sentis apartan interesiĝon pri lingvoj, eĉ mi rekte timis ilin, havinta post mi nur malsukcesojn. Dank' al Esperanto mi komprenis kaj ekamis la lingvostrukturen, eĉ ĝi pelis min al nova vivocelo: fariĝi lingvoinstruisto.

★ **Do ni benu vin, ĉar vi ne sukcesis trapasi la ekzamenon en la teatra altlernejo. Mi deziras daŭrigi la temon pri Esperanto. La ideo de Esperanto estas iasence idealisma, ĉar ni unuopaj homoj per tiu idealismo efektivas niajn revojn, sed aliflanke estas politikistoj kaj lingvaj fakuloj, kiuj klopodas trovi argumentojn kontraŭ Esperanto. Kial inter lingvistoj ne ekzistas konsento pri la valoroj de Esperanto kiel lingvo?**

- Pluraj elstaraj lingvistoj esprimis sian admiron pri nia lingvo, serioza lingvisto ankoraŭ neniam - laŭ miaj informoj - atakis Esperanton. Lingvistoj, kiuj ne konas la lingvon mem, povas eldiri ŝablonajn konstatojn kiel multaj aliaj homoj kuraĝas akre kritiki ĝin sen minimumaj informoj pri la lingvo. El la aktivaj uzantoj neniu trovas la lingvon fuŝaĵo, male, ĉiu estas ravita de ties esprimiveco. Ni bezonas ankoraŭ la sindonan helpon de ĉi tiuj homoj profunde konvinkitaj pri la avantaĝo de neŭtrala internacia lingvo, ĉar estas tre malfacile trarompi la muron de plurjarmila tradicio. Sed ni devas resti certaj pri la fina venko de Esperanto.

★ **Mi ofte aŭdas, ke li (aŭ ŝi) estas vera esperantisto. Laŭ mi jam ne plu sufiĉas la parolkapablo de Esperanto aŭ ĝia disvastigo, sed antaŭ ĉio gravas lia (ŝia) homa interno. Ĉu vi povus provi difini: Kiu laŭ vi estas vera esperantisto?**

- Kiu helpe de komuna supernacia lingvo deziras aktive kontribui al veraj demokratio, egaleco kaj respekto. La lingvo Esperanto estas nur mirinda rimedo por efektiviĝi la ideon de demokratia internaciismo.

★ **Kio estas la avantaĝoj kaj kio la mankoj de Esperanto kaj de la Esperanto-movado?**

- Mi konsideras la plej grava avantaĝo de Esperanto ties neŭtralecon kaj logikecon. La movado instigas al reciproka komprenemo, kaj mi bedaŭras, ke ĉiam aperas en la movado personoj, kiuj deziras dikti laŭ siaj deziroj kaj ne povas akcepti aliajn proponojn. Elasteco kaj internacieco estas nedisigeblaj bazaj proprecoj. Sen ili ne ekzistas vera kaj efika kunagado.

★ **En la mondo konstante ekzistas forta malinklino al Esperanto. Kio, laŭ vi, estas la kaŭzo de tia sinteno, kvankam Esperanto jam multfoje pruviĝis kiel efika internacia lingvo?**

- Tio estas nia plurjarmila tradicio, kaj ŝanĝi tiel forte enradikiĝintan tradicion estas treege malfacile, kvankam ni havas argumentojn tre raciajn kaj ne nur teoriajn, sed ankaŭ praktikajn, tamen la mondo ĉiam ankoraŭ sekvas la vojon de la potenco, t.e. la politike kaj ekonomie plej potenca nacio altrudas sian lingvon al la ceteraj popoloj ĉe transnacia komunikado. Mi firme kredas, ke kelkaj malgrandaj etnoj devus iniciati la enkondukon de Esperanto kaj efike uzi ĝin en siaj interrilatoj. Post kelkaj jaroj certe montriĝos la pozitiva efiko de la neŭtrala lingvo kaj ankaŭ aliaj nacioj sekvus ilian vojon kaj fine, iom post iom, ankaŭ la reganta supernacio devus cedi.

★ **Ĉu vi povus konsili ion al tiuj, kiuj klopodas realigi la ideon de internacia lingvo proksimiganta la homojn?**

- Por fariĝi sinceraj amikoj, necesas konatiĝi kun la kulturo de aliaj popoloj. Ĉiuj kulturoj estas egale gravaj kaj konservindaj. El ĉiu oni povas lerni. La posedo de unusola nacia lingvo estas fortika barilo. En nia moderna mondo ĉiu deziras vidi kaj trovi alietnajn valorojn. Kaj por tio Esperanto estas unika rimedo, kiu rilatas al ĉiu nacio kun egala respekto.

★ **Kiaj perspektivoj, laŭ vi, ekzistas por Esperanto en la estonteco?**

- Mi deziras esperi, ke la mondo sub premo de ekonomiaj kaj politikaj malfacilaĵoj baldaŭ devus trovi racian solvon. Esperanto estas decida paŝo kaj al ekonomia ŝparado kaj al paco delonge arde

dezirata de la plejmulto de la homaro.

★ **Permesu, ĉe la fino, ke mi demandu vin pri via private vivo. Mi promesas, ke la demandoj ne estas malfacilaj ... Kio estas viaj fortaj kaj malfortaj flankoj?**

- Mi konsideras mia pozitiva propreco akuratecon kaj sendependecon. Mi trovas ĝena kaj nevenkebla negatifaĵo, ke mi neniam povas penetri sufiĉe profunden, t.e. en neniu tereno mi havas firmajn, stabilajn konojn, informojn.

★ **Kaj kia estas via vivdeziro?**

- Vivi en paco, protekti naturon kaj demokratiajn homajn rajtojn.

★ **Ĉu ekzistas io en la vivo, kion vi malfacile atingis?**

- Mi neniam strebis al neatingeblaj celoj. Mi ĉiam deziris simplan homan vivon. Kaj tio, feliĉe, absolute sukcesis.

★ **Kio vi deziris fariĝi estinte malgranda knabo?**

- Unue mi deziris fariĝi fervojisto (mia patro laboris ĉe la fervojo), poste kaptis min la teatro kaj kinoarto kaj mi volis labori kiel reĝisoro.

★ **Pri kio vi nun revas?**

- Mi opinias, ke la aktiva periodo de mia vivo forpasis. Nun mi havas nur malgrandajn projektojn. Mi deziras surpaperigi en formo de artikoloj miajn spertojn kaj ideojn, kiuj eble ambiciigos kelkajn personojn, kiuj havas similajn ideojn.

★ **Mi jam malpacience atendas viajn artikolojn ... Diru kiamaniere vi pasigas liberan tempon?**

- Ni havas malgrandan ĝardenon (5 km de nia loĝejo, en la urborando) kaj tie mi laboretas, ĉitage ni iras tien por manĝetigi senhejmajn katojn (nun ni havas ok malsatajn katojn), mi legas E-gazetojn, verkas artikolojn, laborante en la kuirejo aŭskultas radion kaj vespere spektas telenovajojn.

★ **Ĉu estas io en la mondo, kio mirigas vin? Kio, ekzemple, laste haltigis vian spiradon?**

- Ege malĝojigas min, ke la homaro ne lernas el sia malhela historio. Denove amase aperas ekstremaj naciistoj, rasistoj, kiuj povas akcepti nur unu vojon, tiun de siaj maldemokratiaj ideoj. Pri egaleco kaj reciproka respekto ili eĉ aŭdi ne volas. Perforto nenion povas solvi, sed ĉion povas detrui.

★ **Dankon Géza pro viaj sinceraj respondoj kaj mi deziras al vi multe da sano kaj plenumiĝon de viaj revoj.**

Géza Kurucz estas sendube neordinara figuro de Esperantujo kaj imitinda modelo. Li estas ankaŭ bela ekzemplo, ke en la tempo de falo de aŭtoritatoj kaj kulto de mono, oni povas realigi belajn valorojn kaj servi al aliuloj anstataŭ plenumi nur siajn proprajn bezonojn kaj konstrui la aŭtoritaton je megalomanio. Per sia sinteno li scipovas pruvi, ke



# SE NI HAVUS PLI DA TIAJ URBOJ

✍ Josip Pleadin

La redakcion de "Zagreba Esperantisto" agrable surprizis la libro **"Pučki kalendar Bjelovarsko-bilogorske županije 2012"** (Popola kalendaro de Departemento Bjelovar-Bilogora), ricevita de la eldonisto "Čvor" el **Bjelovar**. La agrableco de tiu eldonaĵo troviĝas en la fakto, ke neofte nacilingvaj eldonaĵoj disponigas tiom da spaco kaj en tiel pozitiva lumo priskribas Esperanton kaj Esperantajn eventojn, kiel tion faras la ricevita kalendaro.

Niaj legantoj certe jam scias, ke la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj okazinta en Bjelovar en majo 2011, ricevis planan subtenon de ĉiuj urbaj kaj departementaj instancoj. Tio iasence estas komprenebla. Sed surprizis la bonvolemo per kiu nian aranĝon pritaksis la tute profitcela entrepreno "Čvor". Jam dumkongrese ĝi eldonis specialan eldonon de sia **"Bjelovara gvidilo"** (se vi ne havas ĝin, ĝi estas ankoraŭ ricevebla ĉe Bjelovara Esperantista Societo) kun parte Esperantlingva teksto, kaj kun multaj detaloj pri nia kongreso.

Nun, duonjaron poste, nin atingis la libro, en kies mezo

troviĝas la foto-raporto pri nia kongreso sur 4 plenkoloraj paĝoj (du paĝoj okupas la kongresajn eventojn en Bjelovar, kaj po unu en Velika Pisanica kaj Veliki Grdevac).

Sed, tio ne estas ĉio. Pluraj mencioj pri la kongreso troviĝas ankaŭ en diversaj partoj de aliaj artikoloj. Ni ne legis detale la 176-paĝan libron, sed ni rimarkis menciojn pri Esperanto en jenaj artikoloj: sur la paĝo 100 en la laborraporto de Urbo Bjelovar, sur la paĝo 102 en la raporto de Urbo Daruvar, apartan artikoleon "La 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Kukavica" (paĝo 121, prezentanta la Komunumon Velika Pisanica), duloke en la artikolo "Socia vivo de bjelovaranoj komence de la 20-a jarcento" de Leon Fingerhut (paĝoj 151-153, kun aldonita foto pri Esperanto el 1933). Krom tio, la aŭtoro de unu alia artikolo titolita "Kial festi neekzistantajn datrevenojn?" estas ankaŭ esperantisto, d-ro sci. Goran Jakovljević. La artikolon "La legendo pri virbovo" verkis Franjo Forjan (prezidanto de Bjelovara Esperantista Societo (paĝoj 171-172), kiu mem estas membro de la redakta komitato.



La libro aperis en eldonkvanto de 1500 ekzempleroj kaj estas aĉetebla ĉe **"Čvor" d.o.o., Bjelovar, Matice hrvatske 24, HR-43000 Bjelovar, Kroatio.**

Oni povus pensi, ke la tuto estas merito nur de la kunlaboranta prezidanto de la loka Esperanto-societo, sed mi kredigas al vi, ke temas pri multe pli grava fakto: en Bjelovar Esperanto havas sian firman lokon kiel respektata socia fenomeno, kion montris ankaŭ la urbestro Antun Korušec, estinte nia kongresano n-ro 1, mem partorpeninte la kongreson kaj malferminte ne nur la kongreson, sed ankaŭ la ekspozicion pri Esperanto en la Urba muzeo.

Se ni havus pli da similaj ekzemploj, pli da similaj urboj ....

bono kaj honesto ne estas forgesitaj ecoj, ĉar nur de ni dependas kion ni apogas: homo ja povas esti nobla aŭ kruela. Ne ĉiu tamen scipovas iri la tiel direktitan vojon, ĉar ĝi postulas nekutiman forton de volo, sinoferon kaj determinon. Géza pruvis, ke akcepto de respondecado por siaj faroj estas la sola vojo por fariĝi matura kaj feliĉa homo. Simile kiel Sankta Paŭlo, li avertas nin antaŭ iluzio de nereaj ambicioj: **Ĉar, se iu, estante nenio, sin estimas, kvazaŭ li estas io, li sin trompas.** (Letero al la Galatoj, Gal 6).

Lia longdaŭra laboro en la redakcio de "Juna Amiko" ĉiam vekos admiron kaj estimon, ĉar Geza instruis legantojn ekkoni bonon kaj malbonon, fari ĝustan elekton kaj agi por la afero de homoj bezonantaj helpon.

Mi estas feliĉa, ke mi povis kunlabori kun Géza. Kun bedaŭo tamen mi akceptas lian retiriĝon el plua kunformado de la revuo "Juna Amiko", kaj samtempe mi atendas, ke lia posteulo postiros la vojon de li markitan ...

# DECEMBRO EN FUNEBRO: VIDA JERMAN (1939-2011)

 Josip Pleadin

La 10-an de decembro la tutan Kroation trafulmis la funebra sciigo: Mortis Vida!

Tiutage mi ŝoforis el Petrinja hejmen, revenante post la gvidita Esperanto-kurso. Dum la veturado eksonoris mia poŝtelefono, kaj mia edzino, evidente emociita kaj trista, diris: “Ĉu vi scias kiu mortis? Vida!” En la unua momento mi kopodis trovi iun alian Vida, sed nur Vida la aktorino, la esperantistino venis en mian kapon. Absolute neimageblis ke mortu tiu ĉiam optimisma, ridetanta kaj amikema virino! Sed, la funebra sciigo konfirmiĝis: Vida mortis la 10-an de decembro 2011, poste kelkmonata lukto kontraŭ la nekuraĉebla malsano pri kiu malmultaj sciis. Eĉ antaŭ siaj familianoj ŝi longe kaŝis ĝin. Si ne volis esti malforta, ne volis kaŭzi dolorojn al siaj proksimuloj, multegaj amikoj kaj konatoj ... Ŝi stoike eltenis la lastajn momentojn de sia, ĉiusence riĉa kaj eventoplena vivo.

Por diri ion ajn pri ŝia vivo ne sufiĉas la seka biografia lingvaĵo, sed ĝi povas esprimi nur ĝian “skeleton”: “Vida Jerman, drama aktorino, naskiĝis la 28-an de majo 1939 en Zagrebo. Diplomiĝis pri aktorado ĉe Akademio porteatro en Zagrebo. Poligloto (ŝi parolis la anglan, italan, hispanan kaj Esperanton). Ludis en multaj elstaraj roloj kun internacie famaj aktoroj (Yul Brinner, James Coburn, Meryl Streep, Sir John Gielund, Omar Sharif, Herbert Lom ktp.). Esperantistino ekde 1973. Ekde tiu jaro ŝi ludis kiel membro de Drama grupo de Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo. La esperantista publiko en postaj jaroj memoras ŝin el multaj internaciaj Esperantarangoj, speciale el Universalaj Kongresoj (ekzemple Pekino 1986, Varsovio 1987, Havano 1990, Tampere, 1995, Prago 1996, Adelajdo 1997, Montpellier 1998, Berlino, 1999, Tel-Avivo 2000, Zagrebo 2001 ktp.). Ŝia specialaĵo estis recitado de Esperanta poezio, kaj laŭ ŝia propra opinio, la plej granda ŝia sukceso en Esperanto estis la rolon de la Imperiestrino Maria Theresia, en “La plej longa tago de Maria Theresia” de Miro gavran, kiun ŝi ludis en Kroata nacia teatro en Zagrebo por la UK-kongresanoj.”

La “karnon” sur tiun “skeleton” metas multegaj malpli grandaj roloj, sed la suko de ŝia vivo estas ŝia vivfilozofio, kiun ŝi esprimis en sia lasta intervjuo, donita en printempo 2010 al juralistino de la revuo “Globus” (Zagrebo) Zeljka Godeĉ:

*“El lamentado kaj memkompato estas nenia utilo. Mi povis plori super mia sorto - ho ve, la reĝisoroj*

*min observas kiel objekton kaj mi ne havas laboron. Miaepoke ili konsideris la aktorinojn kiuj aspekta sinforgese bonulinoj kaj intelektulinoj, kaj la virinojn aspektantaj rase kaj barokece, ili neniel povis kunligi kun la saĝo. En aĝo de 40 jaroj mi estis malfeliĉa, ĉar oni vidis min kiel bone aspektantan virinon kun granda brusto. Sed tio instigis min realigi miajn projektojn en kelkaj lingvoj. Kaj mi fariĝis la sola profesia aktorino en Kroatio kiu ludas en Esperanto”.*

En tiu atestaĵo pri si mem, Vida eldiris multajn aferojn kiuj karakterizis ŝin kiel homon. Ŝi havis netipan karieron, ĉar ŝi ĉiam elstarigis sian karakteron de individuo, kiu malfacile kombiniĝis kun klanaj regantaj en la filma industrio. La netipa kariero signifis ankaŭ multfojan elektadon de la propra, malpli facila vojo, sed ankaŭ de la libera dispono pri sia vivo. Egale en la profesia kampo, kiel en la privata.

Ŝi estis membrino de la zagreba Urba teatro “Treŝnja” (Ĉerizo), sed fondis ankaŭ sian teatran grupon “Ponto”, kiu prezentis plejparte teatraĵojn kaj recitalojn en Esperanto.

Esperanto estis unu el ŝiaj ĉefvojoj. Grandan kontribuon ŝi donis al Esperanto kiel parolistino en la Esperantaj elsendoj de Radio Zagrebo (1986-1992), kiel LKK-ano de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo (2001), kiel membrino de la Estraro de Kroata Esperanto-Ligo kaj ankaŭ kiel redaktino de “Zagreba Esperantisto”.

Ankoraŭ nenion antaŭsentante, kroataj esperantistoj por la lasta fojo vidis ŝin publike kiel programvidantinon de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj okazinta en majo 2011 en Bjelovar. Ŝi aspektis gaja kaj kun aparta ĝuo ŝi staris antaŭ la objektivo de la oficiala kongresa fotisto Jozo Lovrić, pozante antaŭ la aŝo de sia UK-teatraĵo pri Maria Theresia, kiun oni surmurigis en la kongresa ekspozicio en la Urba muzeo de Bjelovar.

Neniu komprenis ŝian foreston el la kunsidoj de la Estraro de KEL en postaj monatoj, kaj jarfine venis la ŝoko - Vida ne plu estas kun ni!

Post la publikigo de la trista novaĵo, ĉiuj enlandaj kaj internaciaj novaĵagentejoj publikigis milojn da artikoloj. Buis la radio-stacioj kaj la televido.

Ĉe la lasta adiaŭo en la zagreba tombejo Mirogoj, kolektiĝis ŝiaj multegaj amikoj, inter kiuj plej multaj el la vicoj de artistoj kaj esperantistoj. La tuta kroata esperantistaro staris mute ĉe ŝia lasta





kuŝejo, tremvoĉe oni legis la adiaŭojn kaj Neven Mrzlečki honorigis ŝin per kantoj en la kroata, hispana kaj Esperanto.

Sian plej lastan diplomon por Esperanta kulturlaboro ŝi ricevis de UEA en Havano 2010. Perdi ŝin, por Esperanto estis unu el la plej fortaj batoj en la lastaj jardekoj. Ŝi estis ambasadoro de Esperanto en la kulturaj rondoj de Kroatio, kiu neniam kaŝis tiun sian pasion, sed male, kun fiero parolis pri ĝi publike. Eĉ post ŝia morto ni sentis la gravecon de tiu ŝia informlaboro: absolute ĉiu artikolo, radio- aŭ televid-eslendo akcentis Esperanton kiel plej gravan fakton en ŝia vivo.

Mi ne scias ĉu ŝi antaŭsentis la danĝeran svingadon de la Reĝino Morto super sia kapo, kiam en 2010 ŝi decidis transdoni al mi kiel gvidanto de Dokumenta Esperanto-Centro ampleksan materialon pri siaj vivo kaj kariero. Mi ankaŭ ne povas bedaŭri, ke ne estis filmita ŝia recitado de miaj poemoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj en Kubo 2010, ĉar neniu kapablus tion plenumi pli bone ol faris ŝi en la 8-a kongreso en Velika Gorica.

Kiom ajn ni skribas aŭ parolas pri ŝi, ĉio estas malmulte, nesufiĉe por esprimi tiel grandan kaj tiel kompleksan vivon. Per ŝia forpaso la Esperanta teatro perdis sian fundamenton, Kroata Esperanto-Ligo la estraranon kaj nia redakcio la redakcianon. Ne ekzistas neanstataŭigebla persono, sed eble nur ŝin neniu povos anstataŭi ...

## DECEMBRO EN FUNEBRO

*Al Vida ĉe la disiĝo*

*Decembro kortuŝe ploras,  
decembro en funebro ...  
Sur mortolito kuŝas la artistin'.  
Per ĉerko la vivo ŝin honoras,  
en malgaja tenebro:  
Forpasis filino de la destin'!*

*La Stelo al propra stelaro iras  
kaj tiras sin lacpiede  
kun digno kaj ĝlorakompan'.  
La mondo senspire ŝin admiras  
kaj haltas ĝi senkrede:  
Ekmutas la klakoj de kalkan'...*

*Decembro kortuŝe ploras,  
decembro en funebro ...*

*Josip Pleadin*

# ETA REMEMORO PRI "ZEL-ano"

sojle de la 25-jara datreveno post la apero de la unua numero

*✍ Radenko Milošević*

Kiu esperantisto, ĉu zagreba ĉu kroata, ankoraŭ memoras tiun Esperantlingvan bultenon, kies nur la ĉiunumera resumo estis kroatlingva, kaj la bulteno kostis samtiom da t.n. "ZEL-eroj" kiom la zagreba trambileto?

Preterpasis dudekkvar jaroj post la apero de la unua numero de la "ZELano", la "oficiala bulteno de Zagreba Esperanto-Ligo"! Sekve, antaŭ dudekkvar jaroj aperis en novembro 1987 la unua presita numero de "ZELANO", ofte skribita kiel "ZELano".

"ZELano", ĉe la komenco - monata (dum someraj monatoj julio/aŭgusto aperadis duobla numero), fariĝis oficiala organo de Zagreba Esperanto-Ligo. "ZELANO", verdire, komencis aperadi en novembro de la jaro 1987 kiel "Bulteno". Jam la decembra numero de 1987 aperis sub la nomo "Zelana heroldo - Zeleni vjesnik". Ekde la januara numero de 1988 ĝi transprenis la titolon "ZELANO". La unuajn numerojn redaktis gesinjoroj: Dragutin Balagović (redaktoro), Emilija Lapenna, Radenko Milošević (ĉefa kaj respondeca redaktoro), Ljiljana Pranjić kaj Franjo Šlabek. En la unuaj numeroj la plej granda parto estis informoj pri la sekvontaj prelegoj kaj eventoj en zagrebaj Esperanto-societoj. Kiam la redaktorino fariĝis Ljiljana Pranjić, la enhavo iom post iom riĉiĝis, sed post la

numero de julio-aŭgusto 1988 ŝi ne plu kunlaboris, kaj la taskon transprenis s-ino Marija Belošević kaj pli poste s-ino Nataša Jakovljević. La veraj animo kaj koro de la bulteno estis ĉiam neanstaŭigebla s-ino Marija Belošević - senlace instigante la kunlaborantojn verki, kolektante la tekstojn, skribanta ĉefartikolojn, ktp.

"ZELano" ekaperis kiel modesta kunmetaĵo de laborprogramoj de Zagreba Esperanto-Ligo kaj de jenaj zagrebaj Esperanto-societoj: "Bude Borjan", Fervojista Esperanto-Societo, Studenta Esperanto-Klubo, Internacia Kultura Servo kaj aliaj E-societoj.

"ZELano" estis skribaŝina tajpita, fotokopiita, kun redaktoroj aperintaj kaj malaperintaj, sed kun la redakcia averto: "Rakontu, skribu pri ĉio kaj subskribu, sed ne rerakontu, ne pledu por militoj ĉu en- ĉu interŝtataj kaj ne subtaksu tiujn kiuj laboras kaj eble eraras!"

"ZELano" ricevis kelkfoje atakojn kaj riproĉojn rilate presajn kaj lingvajn erarojn, lingvajn misuzojn kaj diversaj fuŝaĵojn laŭ la slogano: "Kiu laboras - tiu eraras!". Ofte la riproĉintoj pravis, sed ne plenumiĝis malhela estonteco: "ia prognozo de iu", "ke vi (ne) sukcesos publikigi ĉi-jare (1988!) dek numerojn!", sed la "oficiala organo de ZEL kaj ĝiaj redakcianoj" iris obstine - antaŭen!

La "ZELana" enhavo

entenis tre diversajn artikolojn, kiuj iom post iom fariĝis pli abundaj, enhavoriĉaj kaj disflorantaj. Necesas menci, ke la ĉefaj grupoj de artikoloj kaj ĉefaj entreprenitaj programeroj ĉe la komenco rilatis al Esperanto kaj per-por Esperanto. Ekde la novembra numero de la jaro 1988 komencis aperadi la rubrikaj: "ZELaĵoj", "Ĝemelurba paĝo", "Eroj el nia historio", kroatlingvaj resumoj kaj tekstoj pri kroataj granduloj, verkistoj kaj sciencistoj, kaj pri kroataj historiaj menciindaj eventoj.

"ZELano" publikigis la bildstrion "OMBRO", ĉe la komenco pirate kaj pli poste kun la permeso de la aŭtoro s-ro Ninoslav Kunc kaj Esperantigitajn far' Josip Pleadin.

"ZELano" rememorigis pri la kroataj verkistoj kaj sciencistoj: Josip Ruder Bošković, Ivan Gundulić, August Harambašić, Miroslav Krleža, Ivan Kukuljević Sakcinski, Ivan Mažuranić, Vladimir Nazor, Vinko Nikolić, Josip Pupačić, Tin Ujević, Vladimir Vidrić, Grigor Vitez, Stanko Vraz, kaj signifoplenaj eventoj el nia historio kiel "Naŭ jarcentoj post Mare nostrum - Nia maro", "Centjara jubileo de Kroata instruista domo", "320 jarojn post fondiĝo de la universitato", "La slabo de Baŝka" ktp.

La "Ĝemelurba paĝ" gastigis tiomfoje la plej bonajn kunlaborantojn el zagrebaj ĝemelurboj, ekzemple el Bolonjo, membrojn de Esperanto societo "Achille Tellini", ekzemple s-rojn Mario Amadei, Giovanni Grossi, Norberto Saletti kaj ankaŭ el aliaj amikaj urboj, kiel Kioto, Kievo kaj aliaj.

La "ZELano"-adeptoj elumis honordiplomojn kiuj estis atribuitaj al elstaraj esperantistoj, al Esperanto-simpatiantoj kaj al Esperanto-societoj. Plue oni iniciatis literaturan konkurson "Ivo

Rotkvić", kies ĵuria prezidantino estis neforgesebla esperantistino s-ino Emilija Lapenna kaj "ZELano"-adeptoj starigis memortabulon sur la domo de la nuna Placo de la reĝo Tomislav n-ro 21, okaze de la okdekjariĝo post apero de la unua numero de "Kroata esperantisto", kies redaktejo troviĝis en tiu domo, kaj kiun redaktis Danica Bedeković - Pobjenička. Tiu ZEO estis unika Esperanto-monumento en Zagrebo kaj Kroatio.

"ZELano" kiun eldonadis Zagreba Esperanto-ligo estis lulilo ankaŭ por la t.n. "ETLIB" (A6-formataj libretoj). En la literatura "Etlibra serio", omaĝe al la 45-jara datreveno post la fondiĝo de Esperanto-societo "Bude Borjan", estis publikigitaj originalaj poemoj de la societanoj sub la titolo "Jubilea versgirlando". Premiitaj originalaj Esperantaj poemoj de makedonaj esperantistinoj Vera Ĉornij kaj Nevenka Tomić aperis en "Ŝtupoj / Kiel, kien", la poemoj de Dragutin Domjanić en "Sub suno kaj ombro" (tradukitaj de Zvonko Rehoříć), la Esperantlingvaj originalaĵoj de la neforgesebla Esperantlingva poeto Marko Petrović en "Ĥlia tosto je nia kosto" kaj la adapto de "La eta princo", de Antoine de Saint-Exupéry far' Zvezdana Ladika kaj Emilija Lapenna. En la serio pri historio aperis aŭtorita kaj redaktita de s-ro Franjo Šlabek la libreto "Fervoĵista Esperanto-Societo, Zagreb" kaj en la serio sentitola publikiĝis "Kantareto de ZEL".

La paĝoj de "ZELano" naskis, kiel ideon de Nataša Jakovljević, en la septembra kaj oktobra numeroj de 1990, kiam tio necesegis - la ludantajn verdajn kvinpintajn Esperanto-stelojn simbolantajn amikecon, kunlaboron, interkomprenon, kunecon kaj amon. Tiam, bedaŭrinde, jam en la somero



Titolpaĝo de la unua ofsetita numero el januaro 1989

(aŭgusto) de la jaro 1990 komenciĝis la t.n. "traba revolucio"! "ZELano" tuj anoncis siajn zorgojn kaj avertojn pri la estonteco!

Zelano estis inter la unuaj periodaĵoj en Kroatio kaj certe la unua Esperanta revuo en Kroatio, en kiu oni antaŭsentis "kuntiriĝon de malagrablaj kaj danĝeraj ventoj" en la tiama ŝtato. En la februara numero de 1989 estis unufoje konstatite, ke "Malvarmegaj socipolitikaj kaj ekonomiaj ventoj blovas en la ŝtato". Plue la artikolo tekstas jene: "Nova tempo kun nova vento al ĉiu prudentulo ofertas resumadon de la pasinto, antaŭvidadon de estonteco kaj ĝenerale serĉadon de tempo kaj de la esenco." En la decembra numero de 1989

tiucele la legantaro estis avertita per la poemo "Kvara rajdanto" de Mehmedalia Mak Dizdar:

*Tempo estas ke oni pripensu pri tempo,  
ĉar putraĵo ĝis senkonscienco odoraĉas ekde morto putra  
... ĉar grandaj akvoj al ni torentas  
... ĉar tiom malmulte da tempo estas kaj tempo ne plu ekzistos."*

"ZELano" ekaperis en la jaro 1987 neatendite, kaj samtiel ĝi malaperis. Ĝin anstataŭis la gazeto "Kroata esperantisto". "Kroata esperantisto" unufoje aperis en la jaro 1909, kaj reaperis la 18-an de julio 1992. "ZELano" kiel subtera rivero - post la juna numero de 1992 malaperis, enirinte la historian eternecon!

# Mortis patro, avo, esperantisto RATIMIR METZ (1917-2011)

 Zdravka Metz

Kiam mi naskiĝis en 1952, miaj gepatroj jam vivis en Varaždín. Tie ekzistis Esperanto-societo, kaj tiutempe la kurson gvidis Božidar Vančik.

Mia patro aliĝis al tiu kurso. Ĉiumatene, antaŭ ol iri labori, diligente li lernis novajn vortojn, ripetadis gramatikajojn, studis la lingvon. Lia celo estis partopreni la Universalan Kongreson en Zagrebo en 1953. Li realigis sian revon preninte tri liberajn tagojn kaj partopreninte la kongreson.

Pri Esperanto li aŭdis en Bulgario kiam li, kiel juna gimnastikisto, partoprenis internacian gimnastikan renkontiĝon de "Sokol"-organizo. Tiam iu bulgaro menciis Esperanton kiel belan, simplan, internacian lingvon por monda komunikado, kaj mia patro bone memoris tion.

Post la kurso de Esperanto kaj post sia partopreno en la kongreso, mia patro laboris kiel inĝeniero de agronomio, ses tagojn semajne por nutri la kvinmembran familion. Pro la familiaj kaj labordevoj, lia Esperanta agado limiĝis al partopreno en semajnaj kunvenoj de loka societo por praktiki la lingvon kaj helpi laŭeble la societatan laboron. En 1958 li havis profesion specialigon en Nederlando, kaj iun sunan dimanĉon, dum la promeno en Den Haag, sur ies fenestro li rimarkis la skribaĵon ESPERANTO PAROLATA. Li kuraĝis sonorigi, kaj la familio invitis lin por trinki tason da teo. Por li tio estis neforgesebla tago pasigita en amika konversacio



**Tri generacioj de esperantistoj en la UK en Zagrebo 2001: Ratimir Metz (la dua de maldekstre) kun siaj bofilo Normand Fleury, la nepo Damir kaj la filino Zdravka**

kun nekonatoj.

Dum mia infanaĝo, la patro rakontis al siaj tri filinoj, pri Esperanto, sed tio ne tro interesis min. Nur kiam mi ekfrekventis gimnazion, la profesorino de matematiko kaj fiziko Zdenka Ivek informis la gimnazianojn pri Esperanto-kurso okazonta kiel nedeviga lerneja aktiveco. Preskaŭ la tuta klaso aliĝis, do ankaŭ mi faris la samon. Fine de la lernoĵaro, kiam ni jam paroletis la lingvon, la instruistino proponis al ni praktiki korespondadon, viziti aliajn Esperanto-societojn kaj gastigi junajn hungarinojn kiuj vizitis nian urbon. Miaj gepatroj akceptis gastigi unu junulinon kiu ĉe la adiaŭo invitis min veni vizite al ŝi en Hungario.

Mi estis 16-jara, kaj mia patro permesis la vojaĝon. Estis

la jaro 1968, meze de aŭgusto. Miaj gepatroj multe zorgis pro la eventoj en Prago, sed mi mem, gaje kaj senzorge vizitis Hungarion, plene fidante la novan amikinson. Ĉio pasis senprobleme.

Mia patro sammaniere kuraĝigis min kaj aliajn tri junulojn el Varaždín kaj veturigis nin al Zagrebo por ekzameniĝi pri Esperanto. Li subtenis min ankaŭ kiam mi decidis partopreni mian unuan junularan kongreson en Graz en 1970. Tiutempe mia pli aĝa fratino ankaŭ partoprenis la IJK-on kun la Drama grupo de Studenta Esperanto-klubo de Zagrebo. La patro ĝojis ĉar post la kongreso mia koro "verdiĝis", kaj mi decidis gvidi Esperanto-kurson, organizi renkontiĝojn en Varaždín, partopreni aktivecojn de Studenta Esperanto-klubo,

agadi, organizadi, movadumi. Li akceptis ĉiun gastadon de esperantistoj en nia domo, kaj kun granda intereso aŭskultis miajn impresojn post Esperantaj vojaĝoj, renkontiĝoj, kongresoj. Ankaŭ mia pli juna fratino lernis Esperanton, korespondadis kaj ĉefe gastigadis korespondamikojn. Evidente mia patro feliĉis, ĉar ĉiuj tri liaj filinoj lernis Esperanton, ĉiu laŭ sia emo. Kompreneble, kiam mi renkontis Normandon en Finnlando, kiam ni interŝanĝis leterojn kaj vizitojn, mia patro kontentis pro nia amo. Fiere li gvidis min al geedziĝa festo kaj ne tro malgaja, li akompanis nin al flughaveno kiam ni translokiĝis Kanaden. Mi kaj Normando ekloĝis en Montrealo (Kebekio) en 1982.

Kiam naskiĝis nia filo,

mia patro proponis la nomon Damir. Laŭ lia diro, tiu nomo estis destinita por mi, se mi estus knabo. Kiam naskiĝis mia filino Mira, mia patrino jam ne plu vivis, kaj mi invitis mian patron ke li venu viziti nin.

Mia patro venis trifoje Montrealon. Li ĉiam rakontis, ke li ne estis logita de nova kontinento, sed nun, kiam li venis, li rimarkis, ke la arkitekturo de moderna Montrealo estas kvazaŭ futurisma. Li staris antaŭ tiuj modernaj, altaj, vitraj konstruaĵoj kaj admiris ilian aspekton. Egale li admiris kaj respektis sian bofilon Normandon, kiu facile akceptis kroatajn nomojn de siaj gefiloj. Iliaj antaŭnomoj rilatas kaj enhavas la vorton "mir" (=paco) same kiel la nomo de la avo. Mia

patro same feliĉis pro la denaska instruado de Esperanto al siaj genepoj. kaj kiam ni ĉiuj estis kune, li facile parolis la familian lingvon. Ni konversaciis kaj ni ludis en Esperanto.

En 2001 okazis Universala Kongreso en Zagrebo kaj nia tuta familio partoprenis. Estis certe tre kortuŝa momento kiam okazis la inaŭguro dum kiu ni ĉiuj sidis kune. La tri generacioj de esperantistoj: mia patro, mia filo kaj mi.

Mia patro mortis, sed liaj viv-valorajoj, lia humaneco, lia kredo, lia amo, pluvivas en niaj memoroj, en niaj ĉiutagaj agoj.

Mi dankas al li pro ĉio kion li instruis al mi, ankaŭ pro la larĝa fenestro nomata Esperanto, tra kiu mi rigardas la mondon.

## MIRJANA ŽEŽELJ (1949-2011)



Post malfacila batalo kontraŭ kancero, la 7-an de decembro 2011 en Zagrebo forpasis Mirjana Žeželj. Ŝi naskiĝis en Delnice la 28-an de majo 1949, sub la fraŭlina familia

nomo Stipčević. Profesie ŝi estis diplomita ekonomikisto. La diplomon ŝi akiris en la Ekonomia fakultato de Zagrebo en la jaro 1973, kaj tuj poste ŝi eklaboris en la tiama Servo de Socia Librotariado (SDK), kiu post transformiĝo fariĝis Transpagserva insituro (ZAP). Ŝi laboris en ĝia sektoro de analizoj ĝis pensiĝo.

Esperanton ŝi lernis en Varaždin en 1967, kaj en sia juneco gvidis kelkajn Esperanto-kursojn por komencantoj en elementaj lernejoj. Dum la studentaj jaroj ŝi estis membrino de Studenta Espranto-klubo en Zagrebo, en kies Drama sekcio ŝi aktoritis.

Dum pluraj jaroj ŝi estis membro de Universala Esperanto-Asocio kaj fakdelegito pri turismo. Post membriĝo en Esperanto-societo "Bude Borjan" ŝi estis membro de ĝia prezidantaro.

Kun esperantistoj ŝi ofte vojaĝis al diversaj eksterlandaj aranĝoj, aparte al Universalaj Kongresoj. Partopreninto de pluraj kongresoj de kroataj esperantistoj kaj preskaŭ regula gasto de ĉiuj enlandaj Esperanto-aranĝoj, aparte post sia pensiĝo.

Dum sia laboro, ŝi helpis havigi monon por eldonado de la "Tempo", la oficiala gazeto de Kroata Esperanto-Ligo.

Ŝi tradukis Esperanten kelkajn poeziaĵojn aperintajn en la kolekto "En tiu terura momento", kaj kroatigis la romanon de Spomenka Štimec "Ombro sur interna pejzaĝo", kiu restis nepublikigita.

Dum la Universala Kognreso en Zagrebo en la jaro 2001 ŝi engaĝiĝis kiel helpant.

Kvankam multaj el ni ne sciis la veran staton de ŝia malsano, ĉar ŝi ĉiam aspektis serena kaj bonhumora, en 2011 ŝi malvenkis en tiu lukto.

Eternan pacon al nia kara Mirjana!



## Ni estingas fajron ekde 1930

fajroestingaj aparatoj kaj ekipaĵoj  
memaktivigaj aparatoj  
stabilaj sistemoj  
fajroestingado  
sanprotekto kaj sekureco  
mediprotektado  
sekureco kaj prevento de akcidentoj

# PASTOR

G R O U P

[www.pastor-group.com](http://www.pastor-group.com)



GASILSKA OPREMA • GASILSKI SERVIS • GASOP • PASTOR BH • PASTOR DISTRIBUCIJA I INŽENJERING • PASTOR KOSOVA • PASTOR  
MAKEDONIJA • PASTOR PROTUPOŽARNI SISTEMI • PASTOR SERVIS • PASTOR TVA • VATROSPREM • PASTOR FIRE&SAFETY  
**BOSNIO KAJ HERCEGOVINO • KOSOVO • KROATIO • MAKEDONIO • MONTENEGRO • RUMANIO • RUSIO • SERBIO • SLOVENIO**